


# Turka Stelo



## SALUTON,

Aŭtuno venis. Tamen la varmaj tagoj, eble pro la klimata ŝanĝiĝo, ankoraŭ daŭras en diversaj partoj de la mondo kaj ankaŭ en diversaj partoj de nia lando, Turkio. Sed ĉe ni, Istanbulo, la temperaturoj estas tre agrablaj.

La pandemio furoras kaj en la komenco de la nova jaro ĝi fariĝos du jaraĝa.

La vakciniĝo daŭras tra la mondo sed ni ankoraŭ estas tre for de la celata nivelo kaj en multaj landoj ĝi apenaŭ estas en konsiderinda nivelo. Homoj jam komencis forpreni siajn maskojn kaj pro tio la nombro de malsanuloj ne malkreskas. La viruso daŭre aliformiĝas kaj nun ĉie furoras la Delta varianto, unu el la plej danĝeraj formoj ĝis nun. Sciencistoj nuntempe parolas pri la Mu varianto. Homoj kontraŭas la vakcinadon kaj en multaj landoj estas manifestacioj. Jam mortis preskaŭ 5 milionoj da homoj tra la tuta mondo pro la viruso.

Jen koncize la situacio de nia nuntempa mondo!

La plej bona rimedo estas resti hejme, vakciniĝi, kaj

daŭre porti maskon ekstere.

En la oktobra numero de Turka Stelo estas multaj interesaj artikoloj, por ke vi legu kaj restu hejme. Unu el ili estas la longa artikolo de nia amiko Konuralp pri la jam forpasinta franca aktoro Jean Paul Belmondo. Alia forpasinto en septembro estas la fama greka komponisto Mikis Teodorakis kaj la artikolo pri li legindas. Estas multaj aliaj interesaj artikoloj. Rakontoj, historioj, poemoj, ŝercoj, krucvortenigmoj, ktp ktp.

Bonan legadon al ĉiuj !

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
KIEL SIZIFO	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Kataj Historioj	4
Tempo Sigelita	5
ANTIGONA (ANTIFONH)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
La Lasta Leciono (1/2)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	11
Muzikistoj	12
La okuloj	13
Ĉemizo de la feliĉulo	14
Mia lando	16
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (6)	16
Hajkoj	17
EKRA2021 - Poezio - La ĝibulo	18
Ŝercoj	19
Krucvortenigmo	19
La amara pilolo	20
Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo	21
Forpasis la fama komponisto Mikis Teodorakis	22
Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj (parto 1)	23
Poemoj de Marija Mikicej	25
Vintra Brilo	26
Infanlibro de la jaro	27
Poemoj de Stefán Hörður Grímsson	28
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

22/11 Akuzativo, 29/11 Transitiveco  
06/12 Parteciploj, 13/12 Korelativoj  
20/12 Prepozicioj, 27/12 Sufiksoj  
03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

## KIEL SIZIFO

Denove la sonĝo en mia koro

Kvazaŭ kondamno

Al am' efemera, absurda, mortiga

Kvazaŭ kondamno

Al soleco pliposta

Kiel en l'antaŭaj travivaĵoj

Viaj manoj karesadas miajn

Dum mia nazo snufas vian kolon

Kvazaŭ kondamno

Al gesto mielgusta, fajrema, lasciva

Tiel ni ambaŭ laŭis sovaĝan riton

Sine de l'naturato komplezema

Vin mi amas

Ĉu ne estas vana diro,

Kiun vi jam sciis

Kiun mi jam eluzadis

Kvazaŭ kondamniga sentenc'

Cele al mia vivtorturo ?

Sed malgrave !

Mi fermos miajn okulojn

Mia koro estas aperta

Profitante el la nuna ĝu-lulo

Kvazaŭ kondamno

Sizifigi mian fivivon.



verkis **Henriel Fidilalao**  
el Malagasio (Madagaskaro)

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Jen alvoka mesaĝo de Hori Jasuo por la septembra Sumoo. La rezultojn de la Sumoo ni publikigos en nia novembra Turka Stelo revuo.

-----  
Karaj,

En la korona erao Esperanto-Sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto. Tuj sendu vian aliĝon al mi.

Baldaŭ la septembra sumoo (la 71-a Sumoo) komenciĝos la 12-an de septembro kaj daŭros dum du semajnojn. Mi atendas vian aliĝon.

Sendu la jenajn datumojn:

1. Viaj sumoo-nomo kaj vera nomo kun sekso
2. Libro, kiun vi legos (1) Titolo (2) aŭtoro (3) eldonejo
3. Kiom da pag^oj vi legos por unu tago

Bonvolu varbu viajn konatulojn al la Sumoo. Precipe oceanianojn kaj afrikanojn.

### HORI Jasuo

371-0825 Japanio, Gunma,  
Maebaŝi, Ootone 2-13-3  
Retadreso:  
[horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

-----  
Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 977 (2021-09-06)

### UEA survoje al financa resanigo

La 14-an de aŭgusto 2021 la Komitato de

UEA kunside diskutis agadplanon de la Estraro por daŭrigi la financon resanigon de la Asocio. [...]

N-ro 978 (2021-09-09)

### Daŭras la kampanjo de UEA por antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio

La UEA-Komisiono por eŭropa agado kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) daŭrigas la kampanjon por Esperanto en Eŭropa Unio: kadre de la nuna eŭropunia [...]

N-ro 979 (2021-09-15)

### Premifesto de la Belartaj Konkursoj kaj Tago de Veteranoj 2021 fermos la virtualan kongresejon la 19-an de septembro

La virtuala kongresejo ([vk.retevent.com](http://vk.retevent.com)) gastigas la 2-an Virtualan Kongreson de Esperanto (VK) ĝis dimanĉo, la 19-a de septembro 2021. [...]

N-ro 980 (2021-09-20)

### Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2021

La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la 72-a okazigo en premifesto elsendita pere de la [...]

N-ro 981 (2021-09-21)

### Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco 2021

Okaze de la Internacia Tago de Paco, la 21-an de septembro 2021, Universala Esperanto-Asocio (UEA) gratulas Unuiĝintajn Naciojn pro ties ĉiutagaj klopodoj krei pli pacan mondon. [...]

## TEJO



10/09/2021

### Iĝu Komitatano B de TEJO

Pro vaka posteno

ni bonvenigas kandidatiĝojn por Komitatano B de TEJO por la restanta mandato ĝis la fino de aprilo 2022. [...]

15/09/2021

### Partoprenu trejnadon en Danio pri homaj rajtoj

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj la Dana Esperanto Junulara Organizo (DEJO) organizas [...]

15/09/2021

### Partoprenu trejnadon en Bratislavo pri intersekcia aliro

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj la Slovaka Esperanto-Junularo (SKEJ) organizas la trejnadon Diversa, sed Egala [...]

17/09/2021

### Demandaro pri egaleco en la Esperanto-movado


Kiu estas via sperto pri egaleco en nia movado? Respondu la demandaron kaj helpu la komisionon de TEJO pri Egaleco kompreni la nunan staton de [...]

20/09/2021

### Partoprenu TEJO-trejnadojn en Slovakio kaj Danio

Ni invitas vin partopreni en du diversaj TEJO-trejnadoj okazontaj en Slovakio kaj Danio! [...]

## Leteroj de niaj legantoj



Kara,  
Malgraŭ jam pli ol monato da endomigo, la ĉefministro de Viktorio decidis, ke tio ne sufiĉas por garantii la sanon de la tieaj loĝantoj kaj anoncis hieraŭ vespere, ke la endomigo estas plillongigita ĝis la 17-a de septembro. Do ĉi matene mi ellitiĝis, ne sentante multe da energio kun la perspektivo de plua tago en kaĝo. Sed mi trovis la Turkan Stelon en mia leterkesto. Mi ekfoliumis ĝin, ridis pro la diversaj humuraĵoj, mense vojaĝis de Istanbulo al Kanado tra Barato. Koran dankon pro tiu sunradio en mia vivo.

**Franciska Toubale** el Aŭstralio



Kara,  
Salutojn.  
Dankon denove pro la leginda Turka Stelo. Ĝi devas esti pli konata inter esperantistoj. Kvankam mi daurigas verki, ĉiam laŭ miaj nunaj kondiĉoj, mi de tempo al tempo serĉas ĝin por ŝanĝi miajn preferojn rilate esperantan legadon. Por mi esperanto malfermas alian mondon kie mi ne nur legas sed ankaŭ gustumas aliajn temojn kiel arton, filozofion, eĉ kelkfoje religion, kial ne? Ĉio riĉigas nian perspektivon de la mondo. Esperanto ne malpli!  
Dankon kaj bonan laboron al vi kaj al la estimataj

legantoj.

**Carmel Mallia** el Malto



Jam ricevite kaj tralegite kun granda plezuro! Koran dankon kaj pliajn sukcesojn!

Amike kaj altestime

**Gafur Mirzabaev** el Uzbekio




Estimata,  
mi elkore dankas al vi pro la septembra numero de la revueto TS. Ĝi estas interesa, belaspekta kaj leginda  
Amike salutas,

**Laimiundas Abromas** el Litovio

## Kataj historioj

## -- rakontetoj de Elena Popova el Bulgario

### 3. KATO KUN RUĜA KOLRINGO



Tiu kato havas naskiĝtagon kaj ricevis donacon – belan ruĝan koltukon. Ĝi estas surprizita kaj ne scias kion diri. Sed ĝi pensas: "Dankon pri la donaco, sed ĉu mi ricevos kaj ion, kiel ekzemple... fiŝojn? Krom tio mi ŝatas la sporton, sed nun mi enuas, ĉar mi nenie povas iri... Oni rigardas al mi, kvazaŭ mi estas pupo... Ne, mi estas viva estaĵo!..."

- Atendu, kato, por vi estas surprizo!

La kato ne komprenis kaj tristas.

- Kato, la plej bela estas la atendado! Estu trankvila, ni amas vin! – diris la knabineto Bela.

### 4. KATO SUR ANASA BOATO



Kato kun ruza fizionomio, pensas: "Mi ne ŝatas la akvon, sed kia plezuro estas trovi boaton! Mi naĝas, mi rigardas la mondon... Eĉ mi povas vidi kaj kapti iun neatentan fiŝon... La rivero estas tiel granda kaj unuafoje mi ne timas."

- Dankon, kara anaso, pri la bela promonado! Estu viva! – diris fine la kato.

(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario  
la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio



*“Mi kredas, ke oni ne fariĝas aktoro, sed oni naskiĝas aktoro.” – Jean Paul Belmondo*

BOKSISTO - ŜTELISTO - POLICISTO - AGENTO  
– PAJACO - ENAMIĜINTO – DOKTORO POPAUL -  
GANGSTERO - AVENTURISTO - VIRO




**Ŝ**ercema esprimo, pugnoj kiuj eksplodas sur vizaĝo, ĉasado, pafilo, rapido, persekutoj per aŭtoj, saltoj, danĝeraj momentoj... Kaj kompreneble allogaj virinoj. BELMONDO estas la sumo de ĉiuj tiuj kaj similaj elementoj por mi. Alie, ne tiu Belmondo en la filmo "A Bout de Souffle", kiun intelektuloj kutime aludas. Jes, lia stelo en la filmindustrio ekbrilis pere de ĉi tiu filmo. Li pretendas vagantan kaj revan rolulon en ĉi tiu unua filmo, en kiu li famiĝis, sed mi, kiu estas infano de la 70-aj jaroj, amas la plej aventuran, frenezan, belvizaĝan, batalanton, heroon, flirtemulon, karismulon: Belmondo.

Alain Delon sendube faris ankaŭ tre sukcesajn filmojn. Estas ankaŭ filmoj, en kiuj ili kundividis la ĉefajn rolojn, Ekzemple "Parizo brulas" kaj "Borsalino". Sed kontraste al la malvarma kaj ofte aroganta aspekto de Delon, Belmondo estas pli aminda, "homo de la popolo" se tiu diro taŭgas. Li ne estis "malvarma belulo" kiel Delon, sed li estis "malbela belulo" kaj pli atingebla.

Unu el la malmultaj filmoj, kiuj superas la kvalifikaĵojn, kiujn mi menciis estas: "MODERATO CANTABILE". Ĝi estas unu el la malmultaj filmoprovoj de la mondfama Peter Brook, kun teatra origino, kaj ĝi fariĝis sukcesa. Belmondo estas juna viro, kies pasintecon ni ne konas. Ni nur konas lian nomon: Chauvin. Preskaŭ ne ekzistas aliaj datumoj pri ĉi tiu junulo en la filmo. Anne Desbaresdes (Jeanne Moreau) donas al sia juna filo privatajn pianolecionojn. Iutage, dum la leciono, krioj aŭdiĝas de ekstere. La virino kaj la instruisto unue ne zorgas multe. Sed la infano daŭre

scivolemas. Ili malfermas la fenestron kaj vidas homojn, kiuj rapidas al la drinkejo sube. Finfine, la patrino kaj ŝia filo eliras kaj iras al la krimloko. Ili rigardas al la internon kun aliaj homoj de malantaŭ la fenestro. La polico baldaŭ venas kaj arestas la murdiston. La murdita juna virino kuŝas sur la planko. Dum momento, la virino kaj Chauvin faras vidalvidan kontakton. Ĉi tiuj unuaj rigardoj malfermas la pardonon al amo. Chauvin estas unu el la atestantoj de ĉi tiu evento. La sekvan tagon, la virino kuraĝe alvenas kaj eniras la virecan etoson de la drinkejo: ŝi petas vinon. Dialogo kun la junulo komenciĝas. La plej multaj dialogoj, daŭrigas per la demandoj de la virino al la juna viro pri la historio de ĉi tiu ammurdo, pri kial kaj kiel ĝi okazis. La edzo de Anne Desbaresdes posedas la fabrikan, kie laboras Chauvin. En ĉi tiu pesimisma kaj stagna urbo, la edziĝinta virino renkontas la viron



**Ĉ**u blinda obeo al la leĝoj? ĉu obeo al ĉia ajn leĝo? ĉu ankaŭ al leĝo maljusta? al leĝo trudita de tirano? al leĝo kontraŭa al la dia, al la ĝenerala, al la propra moralo?

Jen demandoj tre seriozaj!

Ĉu responditaj?

Mi opinias, ke ankoraŭ ne, almenaŭ ne tute, almenaŭ ne ĉiuokaze, kaj tio, malgraŭ ke antaŭ dekmiloj da jaroj, en la mirindaj tempoj de la mitoj, respondo estis donita, tute klare, tute definitive!



Jes, de iu virino, de Antigona!

Mi parolas pri la senmorta ekzemplo, simbolo de la rezisto al la maljusta tirana forto!

Por atingi tiun mirindan virinon, mi devas iri al pli malnova tempo. Al la tempo de Edipo (Οιδίπους), la plej maljuste persekutita de la fatalo homo.

La tragedia historio de tiu malbonsorta reĝo de Tebo (Θήβα) estis jam rakontita ĉi tie.

Mi diru, ke tiu povra heroo havis kvar infanojn, du filojn, Polinikon (Πολινείκης) kaj Eteoklon (Ετεοκλής), kaj du filinojn, Antigonan kaj Ismenan (Ισμήνη).

Kiam Edipo forlasis sian patrujon kaj en treege malbona stato, blinda, kripla, maljuna kaj senforta, komencis sian sencelan vagadon rekonte al la morto, liaj du senkoraj filoj senkompate lasis lin al lia sorto. Ili turnis al li la dorson kaj pensis nur pri la suvereneco, pri la eblo akiri la tronon de Tebo.

Ismena, junulino al kutimiĝinta al la normala, deca al la virinoj de la palaco, prudento kaj obeemo, pacience kaj silente toleris, ŝlosite en sia apartamento, la suferojn, kiujn kaŭzis la neimagebla tragedio, batinta ŝian familion kaj patrujon.

Antigona, edukita de siaj gepatroj kaj la tuta nobela medio en la same granda severeco, havis tamen spiriton liberan kaj virtan. Tiu bela junulino estis bonkonduta reĝidino, je ĉio normala, ordinara virino, tamen ŝi bone sciis distingi la juston de la maljusto, la

ĝuston de la malĝusto.

Do, ŝi ne povis lasi sian amatan patron sola. Ŝi akompanis lin longe en lia malespera foriro. Ŝi dividis en du partojn liajn suferojn kaj malesperon, ŝi spertis la saman kun li malfeliĉon, ŝi prizorgis lin, ŝi klopodis tenere kvietigi lian korpan kaj animan doloron.

Antigona sciis ami!

Ŝi sekvis sian patron, ĝis kiam li atingis Atenon (Αθήνα). Tie, la reĝo de la glora lando, la granda heroo Tezeo (Θησεύς) akceptis bonkore la malfeliĉan blindulon kaj klopodis lin helpi. Finfine li povis oferi al li nur tion, kion Edipo permesis kaj petis, trankvilan lokon en la sankta parko de la urbo, en kiu li povus kuŝi kaj ripozi porĉiame.

Antigona fermis la okulojn de sia patro kaj poste, obeante al ties lasta deziro, ŝi foriris, lasinte Tezeon zorgi pri la enterigo, laŭ la indikoj de la forpasinto, en nekonata, kaŝita loko!

Antigona revenis al Tebo, kie, dume, estis okazinta nova tumulto, kie novaj malbonoj estis batintaj la malbenitan reĝan familion.

La du reĝidoj, la pli aĝa Poliniko kaj la pli juna Eteoklo, viroj same ambiciaj, obstine depostulis la tronon.

Ĉiu el ili kredis ke li mem rajtas iĝi reĝo, la unua ĉar li estis pli aĝa kaj la dua, ĉar li opiniis, ke li estas pli kapabla.

Estis disputado, estis malkonsento, malakordo, la tuta situacio estis longe nestabila, sed la lando, post tiom da suferoj, bezonis marŝi sur grundo firma.

Estis konflikto inter la du fratoj, tamen la vera ensceniginto de la familia dramo, la persono kiu malice kaj kaŝe movis ĉion, estis Kreono (Κρέων), onklo de la reĝidoj, frato de la forpasinta reĝino Jokasta (Ιοκάστη).

Tiu obskura fizionomio, homo malbona, severa kaj perversa, estis ĉiam sur la proscenio aŭ sur la kuliso de la regado. Post la morto de Lajo (Λαίος), la unua edzo de lia fratino, li iĝis regento de la lando kaj sufiĉe longe li ĝuis la absolutan regpovon, kiu lin ebriigadis.

Poste, aperis Edipo, la dua edzo de Jokasta kaj nova reĝo de Tebo. Kreono restis en la ombro de la taŭga, tute kapabla kaj aminda reĝo. Li klopodis subfosi la agadon de la reĝo, li provis konspiri, insidi, intrigi kontraŭ li, sed tute vane, sensukcese, la reĝo estis tre forta, kapabla, ne ŝanceligebla.

Kreono, do, atendadis pri sia ŝanco, ĉiam akrigante siajn ungojn kaj ŝajnigante ke li helpas kaj subtenas la reĝon.





Kaj la dioj, la severa fatalo favoris lin. Malkovriĝis la konsterna vero pri la rilato de la reĝo kun sia edzino - patrino, disvolviĝis la terura dramo, la reĝino sin mortigis, la reĝo sin blindigis, forlasis ĉion, foriris, restis la du fratoj kaj Kreono!

La malica viro sciis bone, ke venis definitive lia vico. Li ankaŭ bone sciis kion li devas fari por malpacigi la du fratojn. Li favoris Eteoklon, la pli malfortan, nekapablan, naivan reĝidon, kiu tre facile iĝus lia marioneto. Kiam, do, la kverelo iĝis kolizio kaj batalo, superfortis la flanko de Eteoklo kaj Poliniko kun liaj kunuloj estis dumvive ekzilita.

Kiam ĉio tio ĉi okazis, Antigona ne estis en Tebo, ŝi prizorgadis sian patron en lia longa vagado. Ŝi, do, povis nenion oferi al siaj amataj fratoj, nek konsilon, nek helpon, nek zorgon.

Poliniko foriris, li rifuĝis en Argo (Ἄργος), ĉe la potenca reĝo Adrasto (Ἄδραστος), kiu oferis al li protekton kaj gastadon.

Poliniko gajnis ne nur la estimon kaj amikecon de la reĝo Adrasto, sed ankaŭ la koron de ties bela filino Argeja (Ἀργεία), kun kiu li edziĝis kaj akiris filon, nomitan Tesandro (Θέσσανδρος).

En la sekureco de la arga palaco, ĝuante la protekton kaj la malavaran helpon de sia bopatro, Poliniko pretigis metode siajn planojn por la reveno al Tebo, por sia venĝo al la uzurpinto de la teba, patra trono, sia malaminda frato.

Estis aranĝita granda entrepreno de militista forto el sep regnoj. Estis sep armeoj, tiu de Poliniko, tiu de Adrasto kaj ankoraŭ kvin armeoj de aliaj, amikaj al Adrasto suverenoj. Tiu, tiom granda kaj amasa milita ekspedicio, unu el la plej grandaj de ĉiuj epokoj, restis en la daŭro de la jarcentoj konata kiel "sep kontraŭ Tebo".

Tiu granda armeo atingis Tebon. Tie ĝi aranĝis sin kontraŭ la granda civito, en strikta sieĝo, kaj komencis la atakojn.

Estis milito longa kaj kruela, kun kolizioj violentaj, ekstreme sangaj. Estis milito suferiga por ambaŭ flankoj.

La tuta teba popolo suferis pro la sieĝado kiu senigis ĝin je ĉio bezonata kaj kaŭzis inanicion.

Samtempe, la fortoj de la atakintoj suferis pro la longa restado tre malproksime de la patrujo, eĉ pro fremdaj intereso.

Kiam la malkontentiĝo iĝis danĝere evidenta en ambaŭ flankoj, estis reciproka interkonsento. Ĉar la kontraŭeco estis inter la du fratoj, kaj ĉar neniu el ili intencas cedi, ili batalu inter si ĝismorte!

Tiele, la du fratoj renkontiĝis sur la bataltereno, ekster la murego de Tebo.

La malamo inter la du fratoj estis tre forta, tiom, ke ĝi ne lasis ilin eĉ pensi pri batal-plano, pri elekto de la plej taŭgaj armiloj, pri nenio tia. Ili sin ĵetis la unu kontraŭ la alian, kiel du furioziĝintaj taŭroj, ili interbatalis, kun senbrida manio, severe, furioze, violente, tiom senindulge ke post nelonge ili ambaŭ falis senvivaj sur la duel-loko!

Tia estis la fatala finalo de la trista historio, finalo kiu lasis Kreonon sola, absoluta mastro de la lando!

Jes, en nur unu punkto, Kreono iĝis, tute arbitre, suvereno de Tebo. Suvereno tirana, trudordona.

Lia unua decido kaj ordono estis, ke oni enterigu kun honoroj decaj al heroo, Eteoklon, sed lasi al la dispono de la vulturoj, neenterigita la kadavron de Poliniko, kiun li proklamis perfidulo de la patrujo!

Li deklaris tion oficiale kaj publike anoncis, ke tiu kiu aŭdacos enterigi la abomenan kaj malbenitan perfidulon, estos kondamnita al morto!

Malgraŭ ke tiu maljusta decido kaŭzis malkontentiĝon eĉ indignon al multaj alt-ranguloj, ankoraŭ fidelaj al la reĝa familio, neniu kuraĝis kontraŭstari al Kreono, konata pro lia perforteco kaj rigoreco.

Estis, tamen, Antigona! Estis Antigona, kiu ne povis toleri tian sakrilegion. Ŝi jam estis nekonsoleble malfeliĉa pro tio, ke ŝi ne povis pacigi siajn fratojn, pro tio, ke ŝi perdis ambaŭ siajn, same amatajn, fratojn. Kaj nun, profunde malpia decido de kruela despoto minacis unu el siaj fratoj je senigo de la ritaj funebraj ceremonioj, kiujn meritas ĉiu homo.

Antigona prezentiĝis antaŭ la tirano kaj aŭdacis postuli, ke li retiru la sakrilegian decidon. Ŝi klarigis kuraĝe, ke la malpermeso de la enterigo estas ago kontraŭa al la diaj leĝoj, kontraŭa al la moralaj principoj, regantaj la homan vivon.

Kreono ne volis diskuti kun ŝi, li aŭdis indiferente ŝiajn vortojn kaj arogante, ofende forpelis ŝin, ripetinte, ke tiu kiu malobeos lian ordonon, nepre estos kondamnita al morto!

Antigona bone sciis ke ŝi povas nenion atendi de la monstra tirano. Ŝi tute ne hezitis, ŝi iris al la duel-loko, ŝi levis la kadavron de sia frato, ŝi lavis, oleŝmiris, prizorgis ĝin konvene kaj poste, laŭ la tradiciaj ritoj, faris la taŭgan, decan al princo, ceremonion kaj



enterigis sian amatan mortinton.

Post ĉio tio ĉi, Antigona iris rekte ĉe Kreono, ŝi diris al li kion ŝi faris kaj sin allasis al la dispono de la ekzekutisto.

Notinde, ke Antigona ne estis tute sola en tiuj dramaj momentoj. Estis ankaŭ ŝia amato, ŝia fianĉo, Ajmono (Αἴμων), la viro kiu amis ŝin kaj intencis igi ŝin sia edzino. Kaj tiu Ajmono estis la sola filo de Kreono!

Li estis filo de Kreono, tamen tute ne similis al li. Kontraŭe, Ajmono estis persono bona, milda, afabla kaj bonkora, tamen li estis ankaŭ malforta, timida, tute ne rezoluta.

Li amis multe Antigonan, do, en la komenco li klopodis ĉiaforte konvinki ŝin ne rezisti al la malpermeso de lia patro. Li ne sukcesis ŝanĝi ŝian intencon, kaj kiam ŝi, kaŝe, faris tion kion ŝi faris, kiam ŝi estis arestita kaj atendis sian punon. li kuris al sia patro. Li petis, surgenue petegis pri indulgo, pri pardono, sed la rigora tirano restis inerta, tute ne kortuŝita de la doloro kaj petegoj de sia filo.

La kondamno estis severa! Antigona estis enfermita en mallarĝa, malluma kaverno, sen akvo kaj sen nutraĵo!

Ŝi ne kontraŭstaris, ne protestis, ne plendis, ne ploris, ŝi trankvile sekvis la vojon kiun ŝi estis elektinta!

Kiam ĉio estis finita, Ajmono, ne nur pro doloro, sed, eble, ankaŭ pro neeltenebla rimorso, ĉar li ne povis protekti, ĉar li ne povis savi sian valoran amatinon, en momento de profunda malespero, sin

mortigis!

Lia patrino, Eŭridica (Ευρυδίκη), la edzino de Kreono, ne povante elteni la perdon de sia sola filo, sekvis lin, ankaŭ ŝi mortigis sin post nelonge.

Tiu estis la puno de Kreono, kiu en nur kelkaj minutoj perdis - pli ĝuste mortigis - ĉion kion li havis.

Estis puno severa, kiu neniigis la arogantan despoton, tamen tio tute ne interesas nin. Kaj tio, ĉar ni bone scias, ke la fino de la herooj estas ĉiam brila, dum la fino de la ĉiaspecaj abomenuloj restas ĉiam obskura, putrodora.

Antigona montris tute klare la vojon al la justa rezistado. Multaj homoj, ĉiam, ankoraŭ nun, en tiuj ĉi niaj tagoj, ignorante ĉian propran riskon kaj danĝeron, malobeas al ĉia ajn forto, al ordono, al ĉia ajn leĝo kontraŭa al la justo.

En la animoj de ĉiuj tiuj mirindaj homoj vivas la spirito de tiu unua, splenda virino, kiu kondukas nin per la maksimumo: "malobeo al nejusta ordono estas morala devo!"

Antigona, unu el la plej signifaj kaj amataj roluloj de la helena mitologio, kompreneble, inspiris multajn grandajn artistojn. Estas tutmonde konata la majstraĵo de la granda antikv-helena tragediverkisto Sofoklo (Σοφοκλής), lia tragedio "Antigona", kiu estas instruata en la lernejoj de multaj landoj, kaj kiu estas dum jarmiloj prezentata en teatroj de la tuta mondo kaj en diversaj versioj.

Tragedion pri Antigona verkis ankaŭ la same granda helena tragediisto Eŭripido (Ευρυπίδης), kaj aliaj helenaj verkistoj, sed ankaŭ multaj famaj fremdaj, ne helenaj, aŭtoroj kiel Racine, Alamanni, Garnier, Rotrou, Alfieri, Ballanĉe, k.a.

Antigona okupas lokon en la koroj de la liberamaj homoj, sed okupas ankaŭ lokon sur la ĉielo, kie staras la asteroido No 129 havanta ŝian nomon "Antigone".

## GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio  
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

**21>>** **geno:** instrukcioj pri la personaj korpaj proprajtoj, kiujn gepatroj transdonas antaŭ la nasko al siaj idoj.

**kakao:** manĝebla materialo farita el la frukto de la kakao-arbo.

**konsumo:** uzado aŭ manĝado de komerca produkto.

**kultivi:** kreskigi plantojn, prizorgante iliajn bezonojn.

**origine:** rilate al la loko, kie io ekestis, naskiĝis, evoluis.

**sin-sekvo:** serio da aĵoj, regule metitaj unu post alia.

**ŝirmi:** stari antaŭ aŭ super io por defendi ĝin kontraŭ ia

malbonaĵo.

**vario:** difinita speco.

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/maldol%C4%89a-%C4%89okolado-r250/>



**Jean Ribillard kaj Ivo Rotkvić:  
Du magiistoj de la vortoj**

lastajn jarojn en Tahitio, kie li mortis.

**Ĉ**i-foje mi prezentas al vi du verkistojn, kiuj meritas esti nomitaj magiistoj de la vortoj, verkistoj kiuj famiĝis en Esperantujo pro siaj unike esprimriĉaj lingvo kaj stilo: **Jean Ribillard (1904-1962)** kaj **Ivo Rotkvić (1901-1983)**. La unua verkis nur originale, la dua ĉefe traduke, ambaŭ proze.

**Jean Ribillard** naskiĝis en Tour, Francujo. Li servis dum jaroj en la franca armeo en Nord-Afriko, sed eksiĝis el la armeo post la dua mondmilito kaj revenis al Francujo kaj loĝis en Nice. Tie li lernis Esperanton rapide kaj sukcese kaj komencis verki en la lingvo. Lia unua verko, vojaĝrakonto, titolita Kvin bildoj, aperis felietone en "Heroldo de Esperanto". En 1956 aperis ĉe Universala Esperanto-Asocio la broŝuro Vagado sub palmoj, deko da vojaĝbildoj el Alĝerio, tiam regata de la francoj. Ĝi tuj vekis atenton pro la kolor-riĉa precizo de la stilo. Jen ekzemplo el priskribo de la Sahara dezerto:

"Matene netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laŭ la supreniro de la suno ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompiĝas. La ondoliniaj pintmontoj kaose svarmas kun rebriloj flavaj, rozaj, ruĝaj. Poste la krestoj glimlumas kaj eligas kvazaŭ blondan fumon. Estas la vento, kiu, senĉesa laboranto, skrapetas la plejaltaĵojn kaj forbalaas la subtilan sablopolvon."

Ne facila lingvaĵo por komencantoj, sed des pli instiga al progresantoj celantaj plenregon de la lingvo.

Sep jarojn poste, en 1963, unu jaron post lia morto, aperis la dua verko de Ribillard, Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud, eldonita de Stafeto, la eldonejo de Juan Régulo Pérez. Ĝi estas fakte romano, tamen intime bazita sur la spertoj de la aŭtoro en la Nord-Afrika dezerto. Tie la aŭtoro parolas en la personeco de azeno. Tiu parolo estas havas satiran tonon, tamen mildan kaj bonhumoran. La stilo estas flua, neniam rapidanta kaj posedas la saman lirikan karakteron kiel la vojaĝpriskriboj de la antaŭa verko. Matura saĝo karakterizas la viv-observojn de la Majstro N'Saud. Jen unu el liaj satire sagacaj observoj pri la homoj:

"La plimulto de la homoj forĝemas sian vivon pro deziroj, kiujn ili povas tre malofte kontentigi. Kaj kiam ili okaze sukcesas, ili tuj aspiras alion, konstante avidas kaj baraktas por ĉiam pli posedi, ĉiam pli ĝui. Ili sin pravigas, asertante, ke tiu senĉesa emo al akiro kaj plezuro estas la motoro de la progreso."

Ribillard vivis kiel fraŭlo kun siaj gepatroj en Nice. Post ilia morto li forlasis Francujon kaj pasigis siajn

**Ivo Rotkvić**, kroato, lernis Esperanton en 1921, kaj baldaŭ fariĝis tre aktiva en la enlanda Esperantomovado. Inter la du mondmilitoj li gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj estas dirite, ke li eble pli multe ol kiu ajn alia influis la lingvan nivelon de tiama jugoslavia esperantistaro. Li estis membro de la Akademio de Esperanto kaj dum multaj jaroj estrarano de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Li estis fama oratoro, redaktoro de Esperanto-revuoj, kapabla organizanto de Esperanto-aranĝoj – entute movada aktivulo unuaklasa.

Tamen lia reputacio pli intime ligiĝas al lia literatura aktivado. Originale li ja verkis paroladojn, recenzojn, antaŭparolojn – aparte menciinda estas lia eseo "Mesaĝo de nia originala literaturo", kiu aperis fronte de la kolekto "33 rakontoj – la Esperanta novelarto", eldonita de Stafero en 1964. Sed estis ĉefe liaj tradukoj, precipe la libraj tradukoj Cezaro (1934) kaj Tragedio en la Universo (1961), kiuj elstarigas lin kiel la plej eltrovema utiliganto de la latentaj kreopovoj de Esperanto. Cezaro estas ampleksa romano originale verkita de kroata aŭtoro, M. Jelušić. La traduko de Rotkvić signis novan epokon en la lingva evoluo de Esperanto per eksterordinare esprimriĉa lingvaĵo, kie la latentaj povoj de la lingvo estis malkaŝitaj en la servo de belarta stilo. Per tiu traduko Rotkvić gvidis la vojon al postaj Esperanto-verkistoj al nova kriterio de stilo, kiu estas pure Esperanta kaj ne sklave sekvas nacilingvajn modelojn.

Tragedio en la Universo estas originale komuna verko de junaj astronomoj ligitaj al la astronomia Observatorio en Zagreb, dediĉitaj al la afero de monda paco. Sur la frontpaĝo estas informite, ke Ivo Rotkvić esperantigis la verkon el la originala manuskripto. La temo de la verko estas la kosma sorto de nia planedo en okazo de tut-eksterma nuklea milito. Per tiu traduko Rotkvić daŭrigas sur la vojo de lingva evoluo surbaze de la latentaj povoj de Esperanto, kiujn li eĉ pli explore aperigas ol en Cezaro. La eldonisto, Régulo-Pérez, nomis la novan tradukon "majesta fieriga atingiĝo" kaj Rotkvić mem konsideris ĝin lingve supere al la traduko de Cezaro.

Mi estas tiel bonŝanca posedi la Tragedion kun bela aŭtografa dediĉo de la Rotkvić mem. La malgranda volumo de nur 84 paĝoj, la paperaj kovriloj estas iom ĉifitaj, sed la teksto daŭre tenas sian elvokan povon de konvinko pri la unikeco de la lingvo Esperanto. Indas montri specimenon, se nur mallongan, pri la lingvaĵo kaj stilo de tiu eksterordinara libro. Pasaĝeroj de kosma ŝipo vizitas la Teron

dezertigitan per la homfarita kataklismo de atommilito. Ili eniras suburban lokon:

"Ili malsupreniras enen. Nuras mallumo, dezertas stratoj, disdisas objektoj. Nenie io vivanta. La alvenintoj ekkuras tra la mallumaĉajn stratojn, febroserĉe malkovrante vic-postvicajn galeriojn. Sed ĉie alteruras la sama sceno. Objektoj renversitaj senorde. Sur tabloj jen eklegita libro, jen gazeto apud brulstumpa kandelo. Evidente la loĝintoj de ĉi tiu urbo forpanikiĝis el la subtera rifuĝejo kun la subito, plane neantaŭvidita. La pasaĝeroj tralaŭas la ĉefstraton. Ĉe la fino alobstrukcas vitra konstruaĵo. Sure literoj: La administrejo."

La du magiistoj de la vortoj, Ribillard kaj Rotkviĉ, kvankam pasis jardekoj post iliaj forpaso, daŭre tenas siajn meritplenajn poziciojn inter la plej gravaj evoluigintoj de arta Esperanta stilo. Plej bedaŭrinde iliaj verkoj ne plu estas facile haveblaj, sed elektitaj specimenoj nepre meritas esti utiligataj en kursoj de progresantoj.

de **Baldur Ragnarsson**

**Juna amiko**, n-ro 3 / 2011, decembro

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/ribillardrotkvic.html>

## La Lasta Leciono (1/2) -- de Alphonse Daudet

tradukis Michel Dereyger el Francio

**T**iun matenon, mi tre malfruis por iri al la lernejo, kaj mi vere timis ricevi admonon, despli ke sinjoro Hamel diris al ni, ke li pridemandos pri participoj, kaj pri tiuj nenion mi sciis.

Dum momento, mi pripensis : ĉu mi malĉeestos la lecionon kaj trakuros la kampojn?

La vetero estis tiom varma, tiom suna!

Oni aŭdis la merlojn fajfi ĉe la rando de l' arbaro; kaj en la herbejo Rippert, malantaŭ la segejo, la Prusoj trejnadis sin. Ĉio tio allogis min multe pli ol la regulo de l' participoj; sed mi rezistis kaj rapide kuris al la lernejo.

Preterpasante la urbodomon, mi vidis, ke homamaso haltis antaŭ la eta kradaĵo por la afiŝado. De du jaroj, el tie alvenis ĉiuj malbonaj novaĵoj : la perditaj bataloj, la rekvizicioj, la ordonoj de la "komandantur" (milit-komandejo); kaj sen halti, mi pensis: "Kio ankoraŭ okazas?"

Tiam, dum mi trakuris la placon, la forĝisto Wachter, kiu troviĝis tie kun sia metilernanto por legi la afiŝon, kriis al mi :

"Ne tiel rapidu, etulo! Vi ja sufiĉe frue alvenos al via lernejo!"

Mi kredis, ke li primokas min, kaj mi tute senspire eniris en la korton de sinjoro Hamel.

En la komenco de la kurso, bruego aŭdiĝis kutime ĝis sur la strato : la pupitroj malfermitaj kaj fermitaj, la lecionoj, kiujn oni kune rediris, kun la oreloj ŝtopitaj por pli bone lerni, kaj la dikan liniilon de l' instruisto, kiu frapis la tablojn :

"Iom da silento!"

Mi kalkulis kun tiu forta bruo por nevidate iri al mia benko, sed ĝuste tiun tagon ĉio estis trankvila kiel dimanĉan matenon.

Tra la malfermita fenestro, mi vidis miajn kamaradojn jam viciĝintajn ĉe siaj sidlokoj, kaj sinjoron Hamel, kiu iris kaj revenis kun la terura liniilo el fero sub la brako.

Necesis malfermi la pordon kaj eniri meze de tiu granda silento.

Imagu, kiom mi ruĝiĝis kaj timis!

Sed ne!... sinjoro Hamel senkolere rigardis min kaj dolĉe diris al mi :

"Rapidu al via sidloko, mia eta Franz. Ni estis komencontaj sen vi."

Mi superpaŝis mian benkon kaj tuj sidiĝis ĉe mia pupitro.

Nur tiam, iom kvietiĝinte, mi rimarkis, ke nia instruisto surportis sian belan verdan redingoton, sian fajne falditan ĵaboton kaj la vertoĉapon el nigra brodita silko, kiujn li surmetis nur la tagojn de inspektado aŭ disdonado de la premioj.

Fakte, la tuta kurso ŝajnis eksterordinara kaj solena. Sed kio plej mirigis min, estis en la fundo de la klasĉambro, kiam, sur la kutime senhomaj benkoj, mi vidis kelkajn vilaĝanojn, kiuj sidis kaj silentis kiel ni : la maljunan Hauser kun sia trikorna ĉapelo, la eksurbestron, la eksleterportiston, kaj pliajn aliajn personojn.

Ili ĉiuj aspektis tristaj, kaj Hauser estis kunpreninta sian abocolibron kun ties eluzitaj randoj, kiun li tenis plene malfermita sur la genuoj, kun siaj dikaj okulvitroj oblikve metitaj sur la paĝoj.

Dum ĉio tio mirigis min, sinjoro Hamel supreniris sur sian katedron kaj, kun la sama dolĉa voĉo per kiu li bonvenigis min, li diris al ni:

"Infanoj miaj, la lastan fojon mi faras kurson al vi..."

De Berlino alvenis la ordono instrui nur la germanan en la lernejoj de Alzacio kaj Loreno... La nova instruisto alvenos morgaŭ. Estas hodiaŭ via lasta leciono pri la franca. Mi petas, ke vi estu tre atentemaj."

Tiuj kelkaj eldiritaj paroloj emociigis min. Ha! la fiuloj! jen tio, kion ili afiŝis ĉe la urbodomo!

Tio estis mia lasta leciono pri la franca!... kaj mi



apenaŭ sciis skribi! Neniam plu mi lernos! Necesos do, ke de tiam mi haltu la lernadon...

Kiom mi riproĉis al mi tiam la perditan tempon, la kursojn mankitajn por serĉi nestojn aŭ fari glitadojn sur la rivereto Saar! \*

Miaj libroj, kiujn antaŭ momento, mi opiniis tiel tedaj, tiel pezaj por porti, mia gramatiko, mia sankta historio, ĉiuj aspektis tiam kiel malnovaj amikoj, kiujn

mi forlasos kun granda ĉagreno.

\* Saar : *flankrivereto de la rivero Mozelo (kompreneble frostigita tiam).*

(daŭrigota)

tradukis Michel Dereyger el Francio

## el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

### Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

#### Historioj kaj maloj

#### Unuopuloj kaj fremduloj

#### La povra fanfaronulo

Li estas blagulo kaj fantaziulo. Fanfaronulo kaj frenezuleto. Ventfarulo. Mia preferata tipo, sekreta kamarado: la povra fanfaronulo. Liaj antaŭuloj estas la kavalirfripono, la edziĝtrompisto, la ĉarlatano, la megalomaniulo kaj la mitomaniulo. Li estas la bunta malfeliĉulo, kiu altiras la virinojn. Malfidinda kaj senriposa. Soleca ludanto, kiu gajnas kontraŭ neniu, disputas kun neniu. Alten fluganta kaj absimen falanta, kaj eĉ el ties pleja profundo oni aŭdas ankoraŭ liajn lamentadojn de malespero kaj memakuzo.

Ĉe la frizisto li sidas devige senmova en la fotelo. La knabino, kiu tondas al li la harojn, likas el okuloj kaj nazo. "Jam la kvara nazkataro en du monatoj!" Li iomete frenezigas ŝin per komplimentoj kaj profundaj rigardoj en ŝian spegulbildon. Ŝi ridetas, subridas, tusas kaj ridas. Li laŭdas la helpantinon antaŭ ŝia ĉefo kun elektitaj vortoj. "Kia frenezuleto!" diras la etulino, kiam li estas for, sed ŝiaj ŝvelintaj okuloj brilas. "Kian stultaĵon li rakontas!"

"Sed ĉarma li ja estis", diras laŭde kaj iom eksmode la ĉefo.

"Li invitis min al manĝo ĉi vespere."

"Kaj? Ĉu vi iros?"

"Mi vidu. Ŝatus scii, ĉu tio ne estis nur vanaj promesoj."

Kompreneble li ne aperos. Ĉia plenumado enuigas lin, nur la komenco valoras. En ĝi elĉerpiĝas lia intereso kaj lia ekzalto. Anstataŭ tio ni trovas lin vespere en metroo, tute ekstere en antaŭurbo, kie li envere havus nenion por fari. Sed li restas sida en la linio kaj ĉarmigas korpulentan blondulinon, imponan panjon; malfaldas ŝiajn fermitajn trajtojn, per siaj vortoj

modlas belan rideton, gajan okulon. Li tute ne celas delogi - li fuĝas la agon. Li estas frazisto. Vagabundo de la confrence. Iu, kiu ne prezice aŭskultas, povus eble pensi, ke tie kuras homo kun grava manio de gajigisto tra la inhibiciita<sup>3</sup> homaro. Sed kiel li faras tion, ĝi estas multe pli stranga kaj nekonata kaj serenigas la plej multajn alparolantojn, instigas al ili pli leĝerajn pensojn, kaj ili ĝuas duonmire, duone embarasite la bonfaron de viviga sensencaĵo.

Ĝenerale li distingas kun trafa instinkto la alparoleblajn homojn disde la tro firme sigelitaj. Preskaŭ ĉiam estas virinoj, ĉe kiuj glimas ankoraŭ plej longe la sparko de sencela atendo kaj ne senreste forvelkis la sciem-konduo, ja ennaskita en ni. Virinoj, solaj survoje aŭ bonvene ankaŭ kun amikino, tiel ili estas eĉ pli facile distreblaj.

"Se mi ne aŭdintus kriegon, mi ne estus veninta al vi. La kriegon de via tuta esto... Oni devas kredi sin kapabla por io, oni estu pli kuraĝa, multe pli kuraĝa. Vidu, mi multe vojaĝas. De jaroj mi estas trejnisto de la germana nacia tablotenis-teamo, tie vi lernas trudi vin. ..."

Sed foje li tamen mistaksis, alparolas radioraportistinojn, kiu jen tuj rebatas, ne plu lasas lin. Li eskapas ekstimigite, ŝi postkuras. La viro estas sufiĉe kurioza, eksterordinara samtempulo, li nepras antaŭ la mikrofonon. Li sendas ŝin al la diablo kaj defendas sin rabie, tute sen dolĉo kaj sprito. Li sentas sin malkovrita kaj komprometita en sia sekreta umejo. Li hejmas en triĉambra loĝejaĉo. Lia edzino, alkoholmalsana, perdis la laboron. Li zorgas pri ŝi laŭ siaj ebloj. Ĝis antaŭnelonge ŝi estis dungita kiel moddesegnisto, sed poste ŝi ne plu eltenis. Li mem neniam havis normalan profesion. Post ĉesigita studado pri ekonomiko li fariĝis kunposedanto de lu-aĉet-firmao<sup>4</sup>. La afero fiaskis, kaj li troviĝis<sup>5</sup> sur la strato. Trifoje en la semajno li nun disveturigas tolaĵon. Li ĉiam multe legis, prefere historiajn romanojn. Sed ankaŭ agofortajn dramojn. Li ne scias, kion li faras, elirante kaj alparolante homojn.



Li faras tion kun blinda sento; duone malvirte, duone misie, kvazaŭ necesus transdoni al solulo feliĉigan mesaĝon de alia solulo.

Ĉiam denove li ankaŭ kolapsas, fordoniĝas al grava melankolio. Poste li aŭ komplete mutiĝas aŭ multvorte kaj senfine lamentas pri la senvaloreco de sia ekzisto. La edzino, kiu mem apenaŭ kapablas teni sin stare, provas konsoli kaj rerektiligi lin. Ŝi revas jam nur pri elmigrado kaj vivo kiel farmisto ĉe sia fratino en Bolivio.

Lun tagon li vere enamiĝas. Fino de la ludo, la tragedio komencas. Ŝi estas aĉetisto pri ornamaĵoj. Ŝi fariĝis atestanto de grandioza sceno, en kiu la vortfaristo varbis inhibiciitan adoleskanton por la miksitaj ĥoro de la metia asekuro. Ŝi devis tuj ridi pri li. Kiam li alrigardas ŝin, li ne plu povas forkuri. Li iras kun ŝi, fariĝas ŝia amanto. Ŝia supereco evidentas, li estas tute fordonita al ŝi. Li perdas ĉian intereson por aliaj, okazaj homoj. Li senspritiĝas kiel fanfaronulo, velkas kiel ventfaranto. Li perfidas sian edzinon - li ne nur trompas ŝin, sed li forneas ŝin.

Lun vesperon ŝi atendas antaŭ la hotelo, en kiu ambaŭ enamiĝintoj troviĝas kaj vespermanĝas. Kiam ili eliras, ŝi alpaŝas sian edzon kaj petas esti prezentata al lia akompanantino. La viro forpremas ŝin krude kiel duonfrenezan, ĝenan personon. Li eniras taksion kun la belulino kaj forveturas. Li akompanas la komercistinon dum iu el ŝiaj 'turneoj'. Patologia ĵaluzo kaptas lin, ĉar li devas toleri, ke ŝi preskaŭ regule pasigas la vesperojn kun siaj komercpartneroj. Li fariĝas neeltenebla. La eksa fantaziulo, la etvoĉa blagulo perdinta ĉian ĉarmon de fanfaronado, efikas nun duoble banala, senesenca; kaj kiom li mizere alkroĉiĝas al ŝi, traktas ŝin kun riproĉoj, tiom ŝi ŝatus plej eble rapide seniĝi de li. "Kion vi arogas? Kiajn pretendojn vi havas? Kio entute vi estas?" Li estas elĵetita kaj suferas amare.

Fine li revenas hejmen, sed tie ne plu trovas sian edzinon. Amiko rakontas, kiom aĉe ŝi fartis. Fine oni devis meti ŝin en klinikon. Ne, ne en la urbo, sed ie proksime de Stutgarto. Li do vojaĝas tien kaj volas preni ŝin el la sanatorio. La kuracistoj retenas lin kaj mildigas lin. Ŝi kuŝas nun en kuraca dormoĉambro kaj devas esti tri pluajn monatojn ŝirmata de ĉio, kio iel povus ĝeni aŭ maltrankviligi ŝin. Li rajtas vidi ŝin dormantan kaj apudmeti kelkajn florojn. Ŝi eĉ ne ekscios, ke ili estas de li.

"Ni volas sanigi ŝin", diras la kuracisto, "ekzistas ŝancoj, sed oni povas facile forludi ilin."

"Sed ja povus helpi al ŝi, se ŝi scius, ke mi ree estas apud ŝi."

"Atendu. Trankvilu. Longan tempon."

Li atendas longe, sed ŝi ne revenas. Li informiĝas en la kliniko, tie oni diras, ke oni liberigis ŝin antaŭ du semajnoj. Ŝi ne plu revenis hejmen. Certan tempon li nepre serĉas ŝin en ĉiuj anguloj de la urbo. Estas malfacile por li, li preskaŭ ne plu kapablas alparoli fremdulojn. Li nun pli ofte disveturigas tolaĵon. Li legas multe.

Poste, pli ol jaron poste, li vidas ŝin hazarde en la parko ĉebrake de malalta, iom maljuna viro, kiu portas nigran ĉapelon. Li vokas ŝian nomon. Ŝi ne reagas. Li postkuras ŝin. Jen ŝi returnas sin. Li haltas kvazaŭ ŝtonigite. Li vokas ŝin refoje. Ŝi skuas la kapon. Ne, ne estas ŝi. La paro pluiras. Li ne trompiĝis: ŝi fariĝis fremdulino.

<sup>1</sup> *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss2.html>

## Muzikistoj

## fabloj de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Invitis grandsinjor' najbaron por tagmanĝo.  
Favoris li al kantoj kaj muzik'  
Kaj volis al najbar-amik'  
Kantistojn montri per la ĥor-aranĝo.  
Ekkantis vigla ĥor' ĥaose kaj sen ord',  
Kun falsa ton', kun krio senmezura.  
En kapo de la gast' estiĝis bruo nura  
Vertiĝon havis li pro tiu kant-rekord'.  
"Indulgu min!" li diris kun ekmiro:  
"Kriaĉas kantistar'. La tuta ĥor'  
Absurdas kun fervor!"

"Ĝi estas vero, mankas la inspiro,  
Kaj ili falsas nun en certa grad',  
Sed tamen fremdas ili al drinkad'  
Kaj bonkonduktas ĉiu viro."  
Al tio diras mi: vi drinku en prefer',  
Sed taŭgu por afer'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)  
Ukrainio

**Ĉ**e la eldono de MAS aperis iela bukedo de poemoj el ĉiaj stiloj, aŭtoroj kaj landoj, titolita «**En la lumoj de ekmiroj**» Esperantigis ilin mi.

La libro estas havebla ĉe UEA, ĉe Flandra Esperanto Ligo, ĉe SAT-amikaro (kie oni povas pagi per ĉekoj), kaj ĉe multaj portaloj de enreta librokomerco, serĉu en la interreto per la titolo, vi vidos !

Jen unu el tiuj poemoj, de la belga kantisto Julos Beaucarne (aliaj jam aperis en la kolumnoj de Turka Stelo) :

### LA OKULOJ

Vidu, kiel dolĉe, kiel bone  
estas ĉiuj kiel fratoj loĝi kune.  
Estas kvazaŭ rara oleo sur kapo fluanta  
malsupren sur barbon sur vestokolumojn.  
Kvazaŭ roso  
malsupreniĝanta el de la montoj.  
Tie kuŝas viv' por ĉiam,  
tie kuŝas viv' por ĉiam.


La okuloj restadis kontraŭ miaj,  
Ili ne volis foriri.  
Mi diradis al ili: « iru for! »,  
ili restadis  
fikse senmovaj.  
Tial,  
Mi pelis ilin per bastono,  
per piedbatoj;  
Sed kiam ilin oni forpeladis  
oni vidis ilin tuj revenantaj galope,  
kaj vidis ilin sin posteni  
kontraŭ la proprajn okulojn,  
kontraŭ la propran nazon mian.  
Tial mi iris serĉi ajlon,  
mi tranĉis cepojn,  
kaj mi plorigis ilin !  
Sed la okuloj restadis,  
enradikiĝintaj kiel plantoj,

Ili nepre ne volis foriri.  
Tial,  
ĉar mi komprenis ke,  
mi ne povos ilin forpeli,  
mi lasis ilin eniri en mian domon.  
Ili manĝis ĉe mia tablo mian panon,  
kaj partigis ĉion, kion mi havis,  
kaj ĉefe ĉion,  
kion mi ne havis.  
Tial,  
tiuj okuloj iĝis miaj propraj,  
kaj miaj propraj iĝis tiuj.

Vidu, kiel dolĉe, kiel bone  
estas ĉiuj kiel fratoj loĝi kune.  
Estas kvazaŭ rara oleo sur kapo fluanta  
malsupren sur barbon sur vestokolumojn.  
Kvazaŭ roso  
malsupreniĝanta el de la montoj.  
Tie kuŝas viv' por ĉiam,  
tie kuŝas viv' por ĉiam.



Esperantigis **Roland Platteau** el FRancio 5/3/2010



Albana rakonto de Xhaferr Martini



**L**a reĝo de Burxull opiniis ke li regas juste. La korteganoj, ministroj kaj proksimuloj, pri tio konfesis ĉiutage ke la reĝo sentas sin fiera, ĉar, kvankam li ekzercis absolutan potencon regadon, la homoj tamen estas feliĉaj. Parolante pri la ceteraj reĝoj loĝantaj al tiu loko proksime aŭ malproksime, li diradis:

“Neniu regas pli juste ol mi. En kiu ajn alia reĝlando oni apenaŭ povas trovi feliĉulon aŭ kontentulon”.

Ministroj kaj korteganoj, rigardante sian reĝon tiom bonfartan, daŭre laŭdis lin.

Dume en la palaco ekzistis oficejo, ekde tempo de sia patro, kie oni akceptis petojn, sugestojn kaj plendojn de la civitanoj. La oficejo funkciadis enorde, ĉar la iama reĝo, la veron dirante, konsideris la dirindaĵojn, ekaŭdis la voĉon de la popolo, kvankam kiel de ĉiu reĝo ankaŭ liaj oreloj estis iom malbone aŭdantaj.

Sed laŭ la juna nova reĝo tiu oficejo ŝajnis neutila kaj sekve nebezona.

La ministro pri informado, konante la deziron de la reĝo por glorigi sian regadon kiel justa kaj senmakula, estis ordoninta la sekretarion de la oficejo kaŝi la plendojn de la popolo por ke tiuj ne maltrankviligu la reĝon.

En la kunveno de la registaro mem estis ministro, kiu deklaris, ke tiu oficejo, kie oni apenaŭ ricevas iun plendon ne devas ekzisti plu. Krome, aldonis li, ke li jam milfoje deklaris la fakton evidenta ke la reĝo regas juste. La ceteraj ministroj ne nur tuj aprobis ĉi tiun eldiron de sia kolego, sed ankaŭ longe aplaudis lin.

La aferoj en la reĝlando de Burxull glatis, sed okazis io ne atendita: la reĝo grave malsaniĝis. Lin vizitis la plej bonaj kuracistoj de la lando, sed ili nenion povis fari, ĉar la kaŭzo estis nekonata.

lutage preterpasis la palacon maljunulo kiu

pretendis, ke li kapablas resanigi la reĝon. Kvankam la reĝo ne fidis al la vagabondoj, li ordonis, ke la gardistoj permesu al tiu enveni. Sed la reĝo mem ne volis babilo kun li senpere. Tiel li petis la ministrojn por akiri informon per babilado kun la maljunulo. Poste oni eksciis ke la maljunulo mem ne povos kuraci la reĝon, sed li diris ke tio estos ebla, se la reĝo survestos ĉemizon de iu feliĉulo en lia regno.

La korteganoj, ministroj kaj proksimuloj de la reĝo ne povis esti feliĉaj, tiom longe kiom ilia moŝto malsanas. La ĉemizo de la feliĉulo devus esti serĉata en profundo de la regno, ĉe tiuj kiuj ankoraŭ nenion sciis pri la reĝa malsano. Por ne perdi tempon, ekveturis tri junaj rajdistoj, estrataj de la komandanto de la reĝa gvardio. Ili ĉirkaŭrajdis la tutan regnon tre rapide por serĉi feliĉulojn. Ili vizitis la riĉulojn, ĉe kiuj mankis nenio. Sed kia miro! Neniu el ili estis feliĉa. Ili estis riĉaj, potencaj, plenaj de sano, sed nenimaniere feliĉaj. Tion tiuj mem konfesis proprabuŝe, do ili ne bezonis demandi tiujn pri la kialo de malfeliĉeco. Do, ne estis senco, ke ili prenu ties ĉemizojn por resanigi la reĝon.

La komandanto de la reĝa gvardio bone sciis, ke oni lin atendas senpacience en la palaco, sed neniu tie povis imagi pri la malfacilaĵoj renkontitaj de la rajdistoj.

Tiel serĉante kaj serĉante, feliĉuloj ne troviĝis en la tuta regno. Ili denove faris enketojn laŭvice unu post la alia, sed sen sukceso.

Oni demandis ankaŭ Myqerem bejon, - posedanta la regionojn de Drinas, Transdrinas, Breglumas, - kiu estis juna kaj forta, riĉa senfine, kun tre ĉarma edzino, kun 40 miloj da ŝafoj, kun du salejoj alportantaj multe da enspezoj, sed surprizige li respondis, ke fakte li estas la plej malfeliĉa homo.

- Hundaĉo - senprudente diris al li la komandanto de la reĝa gvardio. - Kial do vi ne estas feliĉa? Ĉu vi deziras ke Lia moŝto ne resaniĝu? La reĝo jam donis al vi ĉiujn, ĉi tiujn bonaĵojn kaj tamen vi estas sendanka?

- Ne hastu Sefedin agao - respondis Myqerem bejo malfacile retenante sin. - Vi ne kapablas scii kial mi ne estas feliĉa.

- Kial, vi ido de hundaĉo, ĉu vi deziras ekhavi nian tutan regnon?

- Ne tion, ne tion, - mallaŭte diris Myqerem bejo kaj montris per mansignoj ke li ne povas paroli antaŭ okuloj de la gardiaj rajdistoj.

- Iru bravuloj kaj manĝu kelkajn ĉerizojn en la ĝardeno - petis li ilin kaj post kiam li restis sola kun Sefedin agao, li stariĝis de la sidloko, kaptis permane la komandanton de la gvardio, kondukis lin al la

fenestro de kie vidiĝis la granda ĝardeno, kie laboris viro kun densharara brusto, kiel urso, kun malgrandaj okuloj, griziĝinta sed preskaŭ sen okulharoj kaj sen brovoj.

- Ĉu vi vidas tiun viron Sefedin agao kiu tranĉetas la arbojn?- demandis lin Myqerem-bejo.

- Jes, mi vidas lin.

- Li estas la edzo de mia edzino, tiu ĉarmulino pri kiu vi jam aŭdis eĉ en la reĝa kortego.

"Tiu ĉi nia regno estas ja malbonodora", volis eldiri la komandanto de la reĝa gvardio, sed li subigis sian deziron kaj dentopremis por ke li ne malfermu la buŝon al ofendo.

- Mi ne plu povas kontentigi virinon - konfesis Myqerem bejo – ĉar mi estas impotenta, nekoitiva. Mi edziĝis por ne postlasi la riĉaĵojn miapartajn al miaj fratoj. Dume la virino apenaŭ povas ekzisti sen viro kaj ĉiun nokton ŝi dormas samlite kun tiu urso, ne kun mi. Kiel mi povus esti feliĉa?

- Unuvorte, en nia regno - diris Sefedin agao - ĉiu havas en sia anuso palison, sed la via estas la plej dika.

Poste li alvokis la rajdistojn kaj ordonis ilin pretiĝi por reiri, esperon perdinte.

Kiam ili preterpasis vilaĝan strateton, ili aŭdis iun kanti. La voĉo ne estis tiel agrabla: fakte ĝi estis iom dika, malmola, sed la kanzono mem allogis ilin, kvankam ne melodie. Maldekstre estis la rivero, kun kampetoj ĉe borde, semitaj per maizo. Ili ekveturis frujunie, kiam la maizplantoj jam pretis por senherbaĉiĝi kaj nun la maizspadikoj jam estis preskaŭ maturaj. Ili ekiris, orgojluloj, vestintaj en uniformoj brilaj, kaj nun revenas malpuraj, malglataj kaj esperperditaj. Dume ill ekflaris bonan odoron de la freŝaj maizspadikoj bakitaj surfajre, kvankam alta heĝo el arboj baris la vidon. Kiam la heĝo finiĝis, ili rimarkis ĉe la fajrejo kie bakiĝis la maizspadikoj ĉe rivera bordo ĉirkaŭ kvindekjaran viron kantantan.

- Venu! - ordonis la komandanto.

- Kien ni iru?- demandis unu el la rajdistoj.

Ili estis jam tro lacaj kaj enuiĝintaj, tial ili ne alparolis aliulojn respekte kun la mano surkore kiel la unuan tagon de sia serĉado de feliĉulo.

- Li kantas, do li devas esti feliĉa - diris Sefedin agao.

- Ĉu ne kantas multaj homoj same?- rimarkis unu el la akompanantoj, tamen ili estis irantaj al tiu kantanto.

- La buŝo povas kanti, sed la koro povas plori. Tiu ĉi viro estas ĉifonulo. Kiel eblas ke li estas feliĉulo?!- aldonis la alia akompananto.

Sefedin agao salutis la viron bakintan

maizspadikojn. Li havis mienon de hunda ido kiu estis enkotumita por trovi nutraĵon. Sed li estis sana, kun okuloj mirantaj, dikaj lipoj kaj kapharoj glataj kvazaŭ lin estis ĵus lekuminta bovino. Ekvidinte la kvaropon de viroj, li interrompis la kantadon, ne montrante sin timigita.

- Vi kantis, ĉu?- demandis lin la komandanto.

- Jes, mi kantis - respondis li.

- Vi devas esti feliĉa, ĉar vi kantas, ĉu ne? Aŭ ĉu vi faras tion ne pro tio?

- Feliĉa mi estas, efektive feliĉa - konfirmis la viro kaj vere ŝajnis tia, almenaŭ tiel, kiel li komprenis la feliĉon.

- Kial vi estas feliĉa?

- Mi ne scias tion.

La komandanto sciigis lin pri la celo de ilia alveno kaj vagado dum tri monatoj tra la regno.

- Donu al ni vian ĉemizon, por ke ni alportu ĝin al la reĝo. Ni pagos anstataŭ ĝi oron.

- Mi bedaŭras sinjoroj, sed mi ne havas ĉemizon - respondis la viro bakanta la maizspadikojn.

Poste li malfermis la mantelaĉon per kiu li involvis sin: aperis la malkovrita brusto. Ververe li ne havis ĉemizon.

La komandanto de la reĝa gvardio foriris galope kaj la akompanantoj postsekvis lin.

esperantigis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

## Floroj de l' bono

Jam estas tempo veki printempon, kiu ankoraŭ dormas en la seka grundo de l' animo.



Jam estas tempo plugi la dezertan ĝardenon, kaj humanigi homon per la humo el amo.

poemo de **Maria Nazaré Laroça**

el Brazilo

Juiz de Fora

22/09/2021



Mia lando, gemo meze de fluidaj kristaloj  
brilanta blue-verdece  
sub somera suno.


Mia lando odoras je l'jasmeno,  
bazilio kaj pelargonio.

Mia lando, geometria desegnaĵo de preĝejo  
moderna kaj antikva.

Mia lando, kunmiksiĝo de sango de maristoj,  
astrologoj, batalantoj kaj religiuloj.

Mia lando, knediĝo de l'penso  
en la incenso kaj en la relikvoj.

Mia lando iras al nova jarcento  
sur ŝipo ekipita de komputila teknologio  
denove serĉanta Tiun Kiu Estas.



poemo de **Imelda Serracino Inglott** el Malto  
poetino kaj eksfarmaciistino



tradukita el la malta  
de **Carmel Mallia** el Malto  
15.6.'21

## La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

## tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio

### 6. Glano kidnapita

**P**izo vere ne estis fanfaroninta al Glano, kiam li diris, ke bezonigita li povis kuri sufiĉe rapide. Liberiginte sin el la strobila bieno, li kuregis antaŭe de sia amiko, netuŝante teron per piedoj.

Glano postrestis, tamen li ne deziris montri sin malforta, tial ĉiutempe pravigis sin:

- Bone estas al vi... Mia kajero falas... La inko ŝpruciĝas... La plumo falas for de la orelo...

Kaj Pizo pli kaj pli malproksimiĝis. Kaj kiam en herbaro malaperis eĉ lia hirtiĝinta hartufo, la kverkido ne eltenis kaj ekkriis:

- Ni ri-po-zu!

- Ne eblas, jam heliĝas! – respondis Rapidulo kaj ekkuris eĉ pli rapide.

Kiel ajn la amikoj urĝis, tamen la oriento pli kaj pli blankiĝis. La unuaj sunradioj jam origis la naĝantajn en ĉielo nubetojn kiuj lante malsupreniĝis.

Subite sur altaĵo svingis per flugiloj ia birdo kaj ĉirpis tiel laŭte, ke timiĝinta Rapidulo renversiĝis transkape sep fojojn kaj ruliĝis en herbaron por kaŝi sin. Li vere timis birdojn. Alkroĉiĝinte la Pizon, bumfalis ankaŭ Glano.

- Faru, kion vi volas, nur ne bekmanĝu min, - ĉirkaŭbrakinte sian kapon, ruliĝis Pizo.

- Mi... ne... estas... birdo, - nekapablis respiri Glano. – Ne timu.

La suno rigardinte teren per okulanguleto tra la pintoj de malhela arbaro, ne eltenis neridetinte. Meze de glata kampo, metinte kapon sub folio, kuŝis la brava Pizo, netimiĝinta unuope ŝovi sin en la dormoĉambron de Strobilo, kaj tremis pro timo de malgranda, en la ĉielspaco ĉirpanta Alaŭdeto. Apud li etendiĝis alia sufokanta heroo – Glano, kiu ne unufoje estis fanfaroninta, ke li povas per unu gambo ĉirkaŭsalti la tutan mondon. Ili ambaŭ kuŝis kaj ne aŭdacis eĉ moviĝi.

- Pro kio vi tremas? – la unua rekonsciiĝis la kverkido?

- Por vi estas bone kaŝi sin, vi esta oblonga, kaj mi estas egale sama – aŭ kuŝanta, aŭ staranta, do kion mi faru? Enteriĝu?

- Ĉi birdo ne minacas al vi, li ĉirpkantas al Suno, - trankviligis la amikon Glano.

- Kaj se finkatinte li ekdeziros bekmanĝi?

- Ja li vidas, ke ni estas pacamaj vojaĝantoj.

- Kaj se li ne estos sufiĉe sata kaj forgesos? Ĉu vi aŭdas, kiel li ĉirpegas? Timigas min.

- Vi ne pravos, li ĝojas. En la birda lingvo ĉi kanto signifas ĉi tion:

*Ĉirp ĉirp ĉirp printempo venas,  
Mi sur kort' infanojn tenas.  
Ĉirp ĉirp ĉirp ni dumsomere*



*Estos sataj, ni scias vere.*  
*Manĝos ĉion – glut, glut, glut,*  
*Manĝos ĉion – glut, glut, glut.*

- Se li ankaŭ siajn infanojn invitos, tiam al ni venos fino, - daŭre tremis Pizo.

- Se vi estas tia malkuraĝulo, revenu al tiu raspilkola Strobilo. En lia ĝardeno laktaj riveroj fluas, kaj li min kelkajn tagojn soifigis, eĉ guteton da akvo domaĝis.

- Ne nur vin, - ekĝemis Pizeto.- Mi povas eĉ Leonon kontraŭstari, sed eĉ mizeran birdeton mi timegas. Kaj kio atendas nin enarbore?

- Ne malkuraĝiĝu, mi estas arbido. Arbaro por mi estas nenia problemo. Ni iru, - Glano kuraĝigis la verdvangan Pizon.

- Ni iru, - kvazaŭ per fremdaj gamboj ekmovis Rapidulo. - Mia patro ankaŭ sur vergo kreskis. Arbojn mi ankaŭ ne timas. Multe pli teruraj estas tiuj, kiuj sidaĉas en ili.

Kvankam li kuraĝigis sin per vortoj, sed ĉiupaŝe Pizo postrestadis de sia amiko kaj senĉese rigardadis malantaŭen. Kaj apudarbore, ekaŭdinte la ĉirpadon de multaj birdetoj, li blankiĝis kaj silente petis:

- Eble ni ankoraŭfoje ripozu?

- Volonte,- respondis Glano. – Ni sidiĝu kaj mi rakontos al vi, kiel mi eĉ Korakon venkis. Vi konas, fraĉjo, mi povus ankaŭ kun Aglo lukti, se li ne timus min.

Pizeto deziris disciplinigi la amikon por ke li ne trofanfaronu, tamen tiumomente el ie bumsaltis surteren terura besto. Ĝi kaptis Glanon sur kolon kaj portis en la arbon.

- Amiko, vi estas portata!- preskaŭ mortinta pro timo, krietis Pizo.

- Dankon pro la atentigo! – Glano apenaŭ havis momenton por krei kaj kune kun la besto malaperis en arbotruo. Kiel ajn li timis, kiel ajn tremis liaj poplitoj kaj klakis liaj dentoj, tamen Pizeto ne intencis fuĝi. Lia amiko estis savinda el malfeliĉo.

Rapidulo kaŝis sin malantaŭ folio kaj singarde ekrigardis ĉirkaŭe. En la arbotruo reaperis la terura longvosta besto kaj forsaltadis ien ajn. Tio estis Sciuro, tamen Pizeto ne rekonis lin, ĉar neniam estis lin vidinta. Post ioma tempo, portante ion en siaj dentoj, tiu monstro revenis en la truon.

„Ke ĝi estas tiel terura kaj granda, estas nur duono de la malfeliĉo, sed kiel mi atingu ĉi truon? – pensadis Pizeto, serĉante konvenan ilon. Kaptinte akran pinglon de pino, li kuraĝe iris arbaren por liberigi sian amikon.

**(daŭrigota)**

*„La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj” estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.*

## Hajkoj

## verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Mankas ili! Dolor!  
La surdeco brulegas.  
Dezertas domo.

Trompet´ vastaĵon  
voĉplenigas. Arbaro  
mutas. Silentiĝas bird´.

Senluna nokto  
ie dolorkrias gitar´  
La matenruĝo!

Piednudaŭtun.´  
Vento pelas foliojn.  
Vintro ĉe sojlo.

Taso da kafo.  
En ĉambro sonas bluson´.  
Animo ĝemas.

Mar´ el sonoj  
Alflugis de senlimoj.  
Tenera nokto!

Eksidiĝis ŝi en  
la malnova fotelo.  
Forpasis la tag´.

Luno sur bordo.  
Senstela ĉielo. Ŝi  
atendas amon.

Aŭtunfolio  
sur la tero falegas.  
Vento ĝin pelas.



verkis kaj sendis **Ivaniĉka MAĜAROVA**  
el Razgrad, Bulgario

**Printempa ekvinokso**

Ĉi senreviĝo  
mensa la tempon vipas.  
Vibras amriĉo,  
ĉar la martaj burĝonoj  
vivon prisimfonias.

La pluvtiktako  
printempa kape kubas,  
grincas ostvrako.

Ulcer' kancera  
ĉe nia vivkulmino.  
Cis la ravino  
haladzas rubaj plastoj  
kaj birdoj agonias.

Kapeton montre  
lacerto flavoreas –  
mise ni veas.

Vibroj aprilas  
florbribe, birdotribe...  
ĉerkoj plu milas.

Se April' verdas,  
Majo jam florabundas  
sed homaj mavoj  
nian Teron inundas...  
Esperon ĉu ni  
perdas?

verkis **La ĝibulo** Jen Februaro

**Vintra solstico**

Aŭtun' sin metas  
en vintron ventosible,  
arboj skeletas.  
La plumba nubogrizo  
gravedas je pluvskurĝoj.

Prujno mantilas  
pomarbe ĉi-matene,  
kreiv' sterilas.

Aĉas Kristnasko,  
sklavigas nin viruso...  
Misfest-etoso.  
Sufero, mortolitoj,  
stertoroj kaj spirurĝoj.

Knalas marbruo  
pro l' vintra ventkolero –  
mensa vakuo.

Oras kaj ruĝas  
la flamoj en Decembro...  
revoj disfuĝas.

Dum rojoj lirlas,  
Januar' blankafloke  
neĝerojn kirlas.  
La mavon homdetruan  
kovras virgeca blanko.

maske grimac-mienas  
al viv-amaro...

...sed jam burĝonas  
mimozoflav' tenere -  
konsol' eksoros,  
ĉar mildaj ĝojosentoj  
baldaŭ ĉie aŭroros.

verkis **La ĝibulo**

poemoj de **Nicolino Rossi** el Italio

**Dua premio en poezio**

24>>>

*centres and then circulated along the periphery.*

<sup>4</sup> Vladimir Ilyich Lenin (1917), *Imperialism, the Highest Stage of Capitalism*, verkita en januaro-junio, 1916 kaj aperinta en la mezo de 1917 en formo de broŝuro en Petrogrado.

<sup>5</sup> Vidu: James, Lawrence (2001), *The Rise and Fall of the British Empire*. Abacus, kaj Hyam, Ronald (2002), *Britain's Imperial Century, 1815–1914: A Study of Empire and Expansion*. Palgrave Macmillan.

<sup>6</sup> John Flint, Cecil Rhodes, verko citita en la librolisto. Paĝo 16 de la Enkonduko. Traduko de la verkinto de ĉi tiu artikolo.

<sup>7</sup> Grupo de 95 studentoj estas selektata ĉiu-jare de: Aŭstralio, Bermudo, Kanado, Ĉinujo, Germanujo, Honkongo, Barato, Israelo, Jamaiko kaj Karibio, Kenjo, Malajzio, Novzelando, Pakistano, Suda Afriko, Sirio, Jordanio, Libano, Palestino, Unuiĝintaj Arabaj

*Emirlandoj, Usono, Okcidentna Afriko, Zambio kaj Zimbabvo. El: <http://www.rhodeshouse.ox.ac.uk/rhodes-scholarship/about-the-rhodes-scholarships>.*

<sup>8</sup> La 8-an de februaro 1870. James Flint, Cecil Rhodes, paĝoj 27-28.

<sup>9</sup> John Flint, Cecil Rhodes, paĝoj 115-116. *Bulvardaj ĉi tie signifas 'sensaciaj' gazetoj, kiuj vaste altiras ĉefe la needukitan publikon.*

<sup>10</sup> Jean Tulard, *Le Grand Empire 1804-1815*, paĝo 323

<sup>11</sup> Eric Anceau, *Napoleon III*, paĝo 372

<sup>12</sup> Gobineau, *Essai sur l'inégalité des races humaines*, édition Jean Boissel, in *Œuvres*, vol. I, Paris, Gallimard, Bibliothèque de la Pléiade, 1983.

<sup>13</sup> Lia unua verko pri tio: *L'Aryen, son rôle social, cours libre de science politique, professé à l'Université de Montpellier (1889-1890)*, Paris, A. Fontemoing, 1899.

## Ŝercoj



### INTELIGENTA KONVERSACIO

Kruko prepariĝas por promeni.

Baniko alvenas: Ĉu mi povas promeni kun vi?

Kruko: Nu, kial ne?

Baniko: Ĉu ni iom konversaciu dumpromene?

Kruko: En ordo, sed nur je la kondiĉo ke la konversacio estu inteligenta.

Baniko: Ja, bone. Sed kian konversacion vi konsiderus inteligenta?

Kruko: Konversacio en kiu mi parolas kaj vi aŭskultas!

\*\*\*

### NEFORGESEBLA ŜULDO

Baniko: Kruko, ĉu vi forgesis ke vi ŝuldas al mi kvindek eŭrojn.

Kruko: Ho, mi ja provas..., sed vi daŭre rememorigas min!

\*\*\*

### NEFORGESINDA SEKRETO

Eta Joĉjo ludas per piedpilko. Li tro forte piedbatas ĝin, kaj rompas fenestron.

Kruko alkuras por la bruo.

Joĉjo plorĝeme: Ho paĉjo, mi ne faris intence.

Kruko: Mi esperas ke ne. Sed sciu, Joĉj', ke la sekreto je feliĉa vivo estas pardonado kaj forgesado. Ĉiam

memoru tion.

Joĉjo: Dankon, paĉj' -- se vi pardonas, mi jam forgesis!


\*\*\*

tradukis **Rikardo Cash** el Francio  
publikigita kun lia permeso

Fonto: [esperanto-anekdotoj@googlegroups.com](mailto:esperanto-anekdotoj@googlegroups.com)



## Krucvortenigmo




### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )

1. Ĉefurbo de Saud-Arabio; 6. \_\_\_ ne fidu, juĝi ne rapidu (Zamenhof); 7. Unua silabo de ipsilono; 8. Kovri per maldika tavolo de oro; 9. La nombro 1000; 11. La litero M; 12. Nord-Italia rivero (akuzativo); 14. Malnovaj (kontraŭo).

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Ŝajnon ne fidu, juĝi ne \_\_\_ (Zamenhof); 2. Unuaj literoj de ljobo; 3. Membro de grupo; 4. Statoj de dormanto; 5. Sufikso signifanta katjono (akuzativo); 6. Mucidaj; 10. Min, vin, \_\_\_; 13. Unua silabo de Ĝakarto.



### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )

1. Dotu! Garnu! 6. Ŝafo \_\_\_ sian lanon, por ke mastro havu panon (Zamenhof); 7. Stiligita pentraĵo sur ligna tabulo, reprezentanta Kriston aŭ sanktulon; 8. Ŝafo donas sian \_\_\_, por ke mastro havu panon (Zamenhof); 9. Mallongigo de Ontario; 10. La litero N.

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Roma magistratano; 2. Rilatan al galino; 3. Filinon de Kadmo; 4. Ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu \_\_\_ (Zamenhof); 5. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

**T**adeo, la prezidanto de urba Esperanto klubo, malfermis lokan gazeton kaj trovis tie, sur la antaŭlasta paĝo, primokan artikolon pri si mem. Li estis devigita gluti tiun „amaran pilolon“. Kion fari? Ĉar hodiaŭ necesas viziti klubejon kaj tie renkontiĝi kun samideanoj. Li kuraĝis aperi surstrate nur post kelkaj horoj, verdire, vestita tiel, ke neniu rekonu lin. Longe li serĉis ion taŭgan inter siaj uzitaj vestoj, metis surkapen kepon, restintan ekde studentaj jaroj. Kiam li iĝis tute malsimila sin mem, li decidis paŝi surstraten. Nenion manĝinte kaj trinkinte li fermis loĝejan pordon kaj direktis sin al la centro de urbo, kie troviĝis klubejo. Duonvoje li memoris, ke forgesis hejme ĉiujn dokumentojn.

„Tio estas tre bone,-trankviliĝis Tadeo. Ĉar mi estas kritikita kaj kondamnita, ekde nun ne plu validas eĉ miaj dokumentoj.“

Dumvoje Tadeo kaŝrigardis la kioskojn de presaĵoj – jes, kaj ĉi tie kuŝas la amaso de tiuj gazetaĉoj kaj atendas legantojn, soifantajn je freŝa sango. Tiuj kun granda plezuro disŝiros malfeliĉulon – Tadeon. Mizeraspekta, sed gaja kioska vendistino ridetis, verŝajne ŝi estis la unua leginta tiun teruran verkaĵon kaj nun atendas. Sendube ŝi arogante demandas:

- „Kiel ci kuraĝas aperi surstrate meztage? Al tiuj, similaj vin, ne estas loko inter ni kaj neniam estos!“  
Poste ŝi elpoŝigos fajfilon kaj alarme fajfos. „Mi devas forkuri, kiom miaj gamboj povas,“ - cerbumis Tadeo.

En la centro de la urbo Tadeo ekvolis trinki tason da kafo, tamen ektimis, por ke ne estu rekonita. Ĉirkaŭrigardis li kaj ekvidis post la dorso tri policistojn, kiuj ankaŭ strange ridetis kaj montris per la fingroj direkten al li. Unu el ili havis alligitan pistolon. Ĉu li pafos nun aŭ iom atendas?

„Kial? Pro kio?“ - eknestis demandoj en la kapo de Tadeo. - „Ĉu vere, tio estas definitiva verdikto kaj mankas iu alia solvo? Mi konsentas, ke mia persona vivo kaj mia esperantista agado portis al neniu utilon. Des pli, ke tiu mia agado malhelpis aliajn kaj forprenis tempon de mi mem.“

Delonge li jam ne plu sciis, kio estas simplaj, ordinaraj homaj ĝojoj, sentoj. Li jam ne plu memoras, kiam manpreme salutis najbaron, kaj kio estas la homa dormo - eĉ ne demandu vi. Nur agado por Esperanto de mateno ĝis vespero, de vespero ĝis mateno. Kaj jen – tia kruela fino, tia tute ne justa sorto. Li pensis fojfoje pri tute alia rekompenco. Ĉio vane... Tadeo returnis sin al policistoj kaj ekbalbutis:

- „Par-do-nu min“. „Tio estas fino“: - komprenis Tadeo kaj ŝirmis vizaĝon per manoj.

Pasis sekundoj kaj minutoj, sed li... restis viva. Finfine li kuraĝis kaŝrigardi kaj ekvidis, ke policistoj gaje ridetante paŝis malproksime antaŭen. La mondo po iomete, po iomete ree komencis sereniĝi. Vere, la lumo malmultis, tamen al Tadeo venis espero, ĉar eble sukcesos saviĝi. „Bone, ke tiuj policistoj estis veraj, tamen se ili estus ne veraj? Se ili estus la transvestintaj kruelaj kritikistoj el tiu gazeto? Tiam eĉ la malnovaj, ĉifonitaj vestaĵoj kaj studentotempa kepo neniom helpus min.“ - konkludis Tadeo. - „Tamen ĉu eble necesus kontraŭstari? Tamen kiel? Mi havas nenan pafilon“ - jam pli kuraĝis li.

Tadeo iris plu malrapide sur la centra urba strato kaj pensis: - „Interese..., la vivo pasas kiel antaŭe, kvazaŭ super mi ne pendas tiu terura katastrofo. Jen bruante veturas busoj, gaje en ilin penetras preterpaŝantoj, ĉe riĉa kiosko ploras infano. La mondo, ŝajne, ankoraŭ vivas. Do – haltu, la momento ĉarma! Tamen mi? Pro kio neniu zorgas pri mia sorto? Eble mi ne plu ekzistas ...? Jes, mi estas ekstermita morale, superversita per la lavakvo de kritiko. Pro tio oni premas la spiradon kaj praktike ne estas ebleco por spiro. Minacas min modesta entombigo, pri kiu, verdire, informos neniu gazeto. Jes. Tamen ĉirkaŭe belas intertempe la vivo. Kia do estas maljusto. Tamen kiom kruelas tiu ĉi mondo al sentema homo. Kiu kuraĝas kondamni min-Tadeon?! Ja mi estas personeco, esperantisto... Kaj tute malmulte necesus, - preni tiun malbonan ulon, tiun suspektaton (nur li povis tiel verki: mi rekonas lian spiradon kaj skribmanieron), tiun bone konatan Salamomon (mi ĵuras – tio estas lia laboro) kaj starigi lin ĉe la muro, kaj pafordoni, kaj tra-ta-ta-ta... Tiam vere eklumus la suno, tiam eĉ mi gaje spirus, tiam iĝus bone vivi kaj dormi kaj ion ajn sonĝi ...“. Tiuj kaj multaj aliaj pensoj abundis en lia kapo. Tiel pensante, Tadeo sin trafis antaŭ la pordo de klubejo. „Stop!“ – haltis li. - „Kion fari? Ĉu eniri aŭ ne? – dubis Tadeo. „-Sed kion mi diru al geklubanoj? Kion pensos esperantistoj pri mi? Kian impreson mi faros al la nova kaj impeta generacio?“ -Tadeo ekcerbumis, profunde kaj enhance, pri la homo inter homoj... „Sufiĉas! – decidis Tadeo. Li ekkraĉis, nazpurigis kaj ekpensis: - „Ĉu kabeiĝi?“

Malgranda homo ektimis la grandan mondon. Priridon timas eĉ tiuj, kiuj nenion timas.

Tadeo returnis sin kaj per malkuraĝaj paŝetoj reiris hejmen.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



**Maldolĉa ĉokolado**

*"Ĉokolado estas perfekta manĝaĵo, tiel sana kiel bongusta, bonfara restarigilo de elĉerpita forto... ĝi estas la plej bona amiko de tiuj, kiuj okupiĝas pri literaturaj aferoj."*

• *Justus, Barono de Liebig (1803-1873)*



**N**e nur verkistoj amas ĉokoladon. La tutmonda konsumo kreskas, precipe en aziaj landoj.

La ĉefa konsistaĵo de ĉokolado estas kakao, farita el la faboj de kakao-arboj. Sed la kultivado de kakao-arboj estas malfacila kaj estas en danĝera situacio jam de multaj jaroj.

Kvankam kakao devenas origine de centra Ameriko, nuntempe ĝiaj ĉefaj produktantoj estas Ebur-Bordo, Ganao kaj Indonezio. Ebur-Bordo kaj Ganao produktas pli ol duonon de la monda kakao. La produktantaj landoj estas malmultaj pro simpla kialo: nur tiuj landoj havas la apartajn veterajn kondiĉojn, kiujn la kakao-arboj bezonas. Kvin ĝis ses milionoj da kamparanoj kreskigas kakao-arbojn en la ekvatora regiono, kie troviĝas pluv-arbaroj. Ilia plua vivado estas endanĝerigita pro la vetera situacio, plantaj malsanoj, kaj pro la prezo de kakao.

La kakao-arbo estas delikata, sentema planto. Ĝi fartas bone precipe en tre malsekaj regionoj, kie multe pluvas kaj ne tro malvarmas. Altaj pluv-arbaraj arboj necesas por ŝirmi la kakao-arbojn kontraŭ tro da suno kaj vento. La nuntempa ŝanĝiĝanta vetera situacio kaŭzas problemojn, precipe kiam estas sekeco. Samtempe fi-insektoj kaj plantmalsanoj povas rapide endanĝerigi la kreskadon de kakao-arboj.

La produktado de ĉokolado estas granda fonto de mono, sed malmulte de tiu mono atingas la homojn, kiuj efektive produktas la kakaon. Tio estas kutima situacio en multaj afrikaj landoj, de kie oni eksportas bazajn materialojn. Aliaj landaj prilaboras la materialojn, kaj gajnegas per la vendo de la finaj produktoj. La mezuma kakao-kultivisto en Ebur-Bordo gajnas nur 97 cendojn tage. Tio estas multe sub la limo de malriĉeco, kiu laŭ la Monda Banko estas 1,90

usonaj dolaroj tage (2020).

Eblus parte solvi la situacion por la kakao-kultivistoj per plibonigo de la terkultivaj metodoj. Ili ankaŭ bezonas pli fortajn variojn de kakao-arboj, kiuj povus pli sukcese kontraŭstari al malsanoj, fiinsektoj, sekeco kaj malbona vetero. Por pli rapide evoluigi tiajn plibonigitajn variojn, sciencistoj esploras la sinsekvon de la kakao-arba genaro.

La produktado de ĉokolado mem en landoj kiel Ganao estas malfacila kaj multekosta. Tial multaj kakao-kultivistoj serĉas aliajn rimedojn por diversigi siajn enspezojn. Jen kuraĝiga ekzemplo:

Elizabeth Obeng estas patrino de kvin infanoj, kiu kultivas kakao-arbaron de 20 000 kvadrataj metroj en centra Ganao. Por pligrandigi sian enspezon, ŝi mastrumas malgrandan vendejon kaj instruas en lernejo. Ŝi ricevas valoregan subtenon de loka kunlabora societo. Tie, ŝi lernis pli bonajn terkultivajn metodojn, ekzemple planti altajn fruktarbojn por ŝirmi la kakao-arbojn. Rezulte, ŝia produktado de kakao kreskis kvaroble. La kroma enspezo ebligis al ŝi pagi la edukadon de siaj infanoj kaj prizorgi siajn kakao-arbojn.

Se ĉokolado estas nia bona amiko, ni ne forgesu, ke nia bona amiko dependas de la klopodoj de homoj kiel Elizabeth.

**Craig Williams**

*Craig Williams estas nov-zelanda esperantisto kaj ĉokolad-amanto. Li estas emerito, kaj antaŭe laboris (ne samtempe!) kiel muzikisto, komputilisto kaj administranto pri proprajoj.*

**NOVAJ VORTOJ**

**barono:** viro, kiu pro sia familia deveno aŭ pro decido de sia reĝo, ricevas apartajn rajtojn, pli ol havas ordinaraj homoj.

**cendo:** malgranda monero kun centona valoro, ekzemple centono de eŭro € aŭ de dolaro \$.

**ĉokolado:** tre bongusta dolĉaĵo, plej ofte brun-kolora.

**dolaro:** mon-unuo \$ en Usono, Kanado, Aŭstralia kaj kelkaj aliaj landoj.

**eksporti:** elporti komercaĵojn al alia lando.

**ekvatoro:** imaga linio ĉirkaŭ la centro de la Tero.

**elĉerpita:** jam foruzinta ĉiujn fortojn.

**fabo:** malgranda aĵo produktita de iuj plantoj, kiun oni povas manĝi, aŭ meti en la teron por produkti novan planton.

**fi-:** tre malbona.

## Forpasis la fama komponisto Mikis Teodorakis (1925-2021)



En la 2-a de septembro 2021 forpasis la granda greka komponisto Mikis Teodorakis.

Mikis Teodorakis, kiu naskiĝis la 29-an de julio 1925, estis unu el la plej famaj grekaj kantverkistoj kaj komponistoj. Internacie, li estas verŝajne plej konata pro siaj kantoj kaj pro siaj partituroj por la filmoj "Zorba la Greka" kaj "Serpico". Saĝe li identiĝis kun la maldekstra flanko ĝis la malfruaj 1980-aj jaroj kaj konstante kontraŭbatalis subpremajn reĝimojn kaj estis la esenca voĉo kontraŭ la greka milita registraro inter la jaroj 1967 kaj 1974, kiam ankaŭ li multfoje malliberiĝis kaj estis persekutita.

La kanto "Sur la strando" de Mikis Theodorakis estas kanto farita sur la poemo "Rifuzo" de la granda greka poeto Jorgos Seferis. Ĝi estas poemo pri la ne eviteblaj ŝanĝoj en niaj vivoj, pri aferoj, kiujn ni amas sed devas forlasi kaj pluri. La kanto estis komponita en 1962. Ĝi estas poemo, kiu enhavas multajn el la distingaj koloroj, frazoj kaj konsiloj, kiuj konsistigas Grekion.

Jen ĝi kantata de la fama greka kantistino Maria Faranturi: <https://www.youtube.com/watch?v=SoGdeg2K81c>

### Άρνηση

Στὸ περιγιάλι τὸ κρυφὸ  
κι ἄσπρο σὰν περιστέρι  
διψάσαμε τὸ μεσημέρι  
μὰ τὸ νερὸ γλυφὸ.

Πάνω στὴν ἄμμο τὴν ξανθὴ  
γράψαμε τ' ὄνομά της  
ὠραῖα ποὺ φύσηξεν ὁ μπάτης \*  
καὶ σβήστηκε ἡ γραφὴ.

Μὲ τί καρδιά, μὲ τί πνοή,  
τί πόθους καὶ τί πάθος  
πήραμε τὴ ζωὴ μας· λάθος!  
κι ἀλλάξαμε ζωὴ.

### Rifuzo

En strando kaŝita  
kaj blanka kiel kolombo  
ni soifis en tagmezo  
sed l'akvo estis saleta.

Sur blondan sablon  
ŝian nomon ni skribis  
sed bele blovis batis \*  
kaj forviŝis la skribon.

Kun kia koro, kia spiro,  
kiaj deziroj kaj kiel pasie  
nian vivovojon prenis; erare!  
kaj ni ŝanĝis vivon.

\* *batis* : vento, kiu eniras de la maro al la tero



Jorgos Seferis estis la plumnomo de Jeorgios Seferiadis (1900 - 1971). Li estis unu el la plej gravaj grekaj poetoj de la 20-a jarcento. Li premiĝis pere de la nobel-premio pri literaturo en la jaro 1963. Li ankaŭ estis kariere diplomato en la Greka Eksterlanda Servo, kiu kulminis per sia nomumo kiel ambasadoro al la UK, posteno, kiun li okupis de 1957 ĝis 1962.



Maria Faranturi, kiu naskiĝis la 28-an de novembro 1947, estas greka kantistino kaj ankaŭ politika kaj kultura aktivulo. Ŝi kunlaboris kun eminentaj grekaj komponistoj, ĉefe kun Mikis Teodorakis.



tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkio

### Resumo

**Ĉ**i tiu artikolo esploras pri la malhelpoj al Esperanto en la merkataliberismaj ekonomioj. Ne temas pri persekutoj kontraŭ danĝera lingvo sed pri malhelpoj kontraŭ lingvo kaj ideo ĝena rilate al la mondordo, kiun ili celas. Tiuj malhelpoj ĉefe konkretiĝas per antaŭenigo de alternativa projekto.

Nia centra tezo estas, ke la malhelpoj al Esperanto fare de Francujo kaj poste de la anglalingva mondo estis pli efikaj kontraŭ Esperanto ol la abomenaj persekutoj kontraŭ homoj fare de naciismaj registaroj.

### 1. En la 19-a jarcento

#### 1.1. Rasaj ideoj kaj imperiismo

Oni scias, ke la 19-a jarcento, la naskiĝ-jarcento de Esperanto, estis jarcento de firmigo kaj ĝeneraligo de la konceptoj pri naciaj ŝtatoj en la kontinenta Eŭropo. Tiu estis ĝenerala pensofluo, kiu influis ĉiujn en tiu epoko, inkluzive de homoj, kiel Zamenhof, kiu tamen favoris la malon, la disfalon de la "obstinaj baroj inter la popoloj dividitaj" <sup>1</sup>. Tamen en sia juneco li interesiĝis pri movadoj kiel cionismo kaj verkis lernolibron de la jida lingvo, la lingvo de la juda popolo <sup>2</sup>. Oni malfacile povas eskapi el la kulturo de sia tempo kaj de sia loko.

Kompreneble Zamenhof estis unu el tiuj homoj, kiuj ja sukcesas eskapi el la idea ĉirkaŭaĵo. Lastatempa artikolo de islanda esploristo eĉ prezentas Esperanton kiel unu el la movadoj por kontraŭi la nacian movadon de la 19-a jarcento <sup>3</sup>.

En tiu sama periodo en aliaj landoj kaj en kontinenta Eŭropo kaj en Britujo kaj iugrade en Usono la ĝenerala publika pensofluo estis konstruanta tute alispecan vidon pri la mondo, en kiu ne superregis ideoj pri frateco kaj interfratiĝo, sed ideoj pri rego de la cetera mondo fare de la blankuloj. Tiuj ideoj estis prezentitaj tiel malkaŝe, ke nun estas malfacile eĉ akcepti, ke la situacio estis tia kaj tiel kontraŭesperantisma en la faktoj. Temis evidente pri imperiismo, kiel lasta stadio de kapitalismo laŭ la esprimo de Lenin <sup>4</sup>.

Kiam temas pri Britujo, la 19-a jarcento estas konata kiel la jarcento de la fina konstruado de la brita imperio <sup>5</sup>. Nenio pli ol la asertoj de publikaj figuroj tre influaj de tiu periodo povas klarigi la specon de etoso tiam reganta. Ni komencas per Cecil Rhodes, ege

influa homo en Britujo dum la dua duono de la 19-a jarcento (Cetere laŭ li la lando Rhodesia ricevis sian nomon.)

"Rhodes pensis pri sekreta elito de anglaj-saksaj homoj dediĉitaj, kiel la filozofiistoj de Platono, porti aŭtoritaton kaj ordon al la tuta mondo, kiuj regos aliajn popolojn por ilia bono mem. Ĉi tiuj dediĉitaj junaj homoj devis esti eltiritaj el Britujo, Norda Ameriko kaj Germanujo, ĉar Rhodes rigardis tiujn landojn ne nur kiel vere blankajn sed ankaŭ destinitajn por mondo-regado." <sup>6</sup> Ĉi tiu revo akompanis lin dum la tuta vivo kaj en sia testamento li alvokis al la kreo de sekreta asocio de angla-saksaj imperi-konstruantoj. Tio, kio restis el tio estas granda skemo de stipendioj por studi en Oksfordo, kiu ankoraŭ nun funkcias, kvankam iom larĝigita kun ebleco enpreni ankaŭ virinojn kaj ankaŭ homojn el novaj landoj <sup>7</sup>.

Sed ne temis nur pri li. Temis pri ĉiuj. Ekzemple John Ruskin, la plej alte taksata artisto de la 19-a jarcento en Britujo, diris en sia inaŭgura parolado <sup>8</sup> en Oksfordo: "Estas nun destino ebla por ni, la plej alta iam ajn metita antaŭ nacio, kiun ni povas akcepti aŭ rifuzi. Ni estas ankoraŭ nedegenerita raso, raso miksitita de la plej pura norda sango...Anglujo...devas fondi koloniojn kiel eble plej vaste..."

Cetere la praktiko de la brita registaro konfirmis en tiuj jaroj la ideojn pri grandigo de la imperio. Sendepende ĉu regis Gladstone aŭ Disraeli oni akiris la kanalon de Suez, Kipron, Malajzion, ktp. La ĵurnaloj postulis ke oni invadu Egiptujon kaj oni invadis ĝin. La reĝino estis kontenta ricevi la titolon de imperiestrino de Hindujo kaj la simpla popolo partoprenis en la ĝenerala sento. La grandaj ĵurnaloj ankaŭ faris sian parton, ekzemple The Times, kies Flora Shaw, la unua grava virina ĵurnalistino kaj kolonia korespondantino, plene subtenis la kolonian mision de Rhodes, kaj eĉ pli grave ankaŭ konkretajn provojn per dungosoldatoj interveni en Suda Afriko fare de Rhodes. Sed ankaŭ la nekonvencia W. T. Stead, kiu ludos gravan rolon pri la disvastigo de Esperanto en Britujo, admiris la imperiajn planojn, la rasajn ideojn kaj la ideon pri sekreta societo angla-saksa de Rhodes, kaj helpis per sia tiama Pall Mall Gazette, unu el la unuaj popolecaj, bulvardaj gazetoj <sup>9</sup>.

Klare ĉiuj planoj de Rhodes, de la brita registaro kaj de aliaj koncernatoj en Britujo konsideris kiel lingvon de la estonta imperio nur la anglan. Nenio alia esti eĉ pensebla. Revoj pri egaleco kiel tiuj kunligitaj kun Esperanto tute ne trovis lokon en la rasisma-imperiisma sinteno de la epoko, en kiu Esperanto



naskiĝis.

Sed kompreneble en tiu periodo tia sinteno ne nur regis en Britujo. Ni devas almenaŭ ekzameni la imperiismajn ideojn en Francujo.

En Francujo ni havas ankaŭ formalan daton pri la naskiĝo de la imperio post la revolucio, Temas pri la 18-a de majo 1804, dato de la deklaro de Napoleono imperiestro de la francoj.

La sekvoj de ĉi tiu imperio estas bone konataj. Malpli konataj estas la sekvoj kulturaj kaj lingvaj. La francoj, kiel ĉiuj imperiistoj, klopodis disvastigi la francan kulturon kaj la francan lingvon. La disvastigo de la lerneja sistemo laŭ la principoj de la revolucio helpis pri tio. Ekzemple ni vidu tion, kio okazis en la Provinces Illyriennes, Iliriaj provincoj, nomo inventita por kunmeti ĉiujn slavajn teritoriojn okupitajn de Napoleono en Jugoslavujo. Formale oni respektas la lokajn lingvojn kaj francaj administrantoj provas lerni ilin sed praktike oni provas per la lernejo asimili la loĝantarojn. Per dekreto de la 4-a de julio 1810 ĉiuj komunumoj devas havi lernejon por knaboj kaj ĉiu distrikto devas havi lernejon por knabinoj. Pluraj liceoj, superaj lernejoj, estas antaŭviditaj kun la instrulingvo nur franca. Multaj ilirianoj estas sendataj al la universitatoj en Francujo <sup>10</sup>.

Cetere, ankaŭ en 1830, kiam estis kreita Belujo, la franca estis perforte konsiderita kiel la sola oficiala lingvo, kontraŭ la flandra parolata de la lokuloj, sed ne de la burĝaro.

En la dua duono de la jarcento, dum la tiel nomata dua imperio, la kolonia puŝo de Francujo intensiĝas. Finfine la kolonia franca imperio, kies surfaco estis malpli granda ol 300.000 kvadrataj kilometroj en 1851, havos surfacon de pli ol 1.000.000 kvadrataj kilometroj en 1870 <sup>11</sup>.

Kompreneble francoj estis pli rigoraj pri la apliko de siaj konceptoj en la kolonioj, kaj la franca iĝis la lingvo devige instruata en ĉiuj lernejoj de la francaj kolonioj, dum angloj ne agis en tiu maniero sed fidis je sia forto por enkonduki la anglan. La franca ĉiuokaze estas prioritare instruata al la infanoj de la lokaj elitoj aŭ de la tribestroj.

Kompreneble malantaŭ tio estis la rasismaj ideoj, kiuj floris en la dua duono de la 19-a jarcento precipe en Francujo. Arthur de Gobineau (1816-1882) disvastigis la ideon en *Essais sur l'inegalite' des races humaines* [Eseo pri la malegaleco de homaj rasoj] <sup>12</sup> de 1855, ke la raso hinda-europa estis la prapatro de ĉiuj estraj klasoj de Europo, kaj aparte de la francaj nobeloj (al kiuj li apertenis). Ĉi tiu verko konvinkis grandan parton de la edukita medio kaj ne kaŭzis protestojn. Eĉ aliaj francoj daŭrigis la laboron, kiel la franca antropologo Georges Vacher de Lapouge, kiu

teoriumas pri la divido de la homoj en Homo europeus, granda, blonda (angla-saksa aŭ norda) protestanto, reganto kaj kreanto kaj en aliaj specioj destinitaj esti sklavo <sup>13</sup>.

Kiel oni povas rimarki Rhodes estis nur praktikulo rilate al ĉi tiuj francaj teoriuloj. Kompreneble ankaŭ por la francoj Esperanto ne havas lokon en mondo bazita sur la lukto inter rasoj.

Apartan situacion ni trovas en tiu periodo en Usono. Certe ankaŭ tie ekzistis ideoj pri supereco de blankuloj, kiel la rilatoj al la nigruloj ĵus liberigitaj el sklaveco pravas, sen bezono pri literaturaj citaĵoj, sed la konstruado de usona imperio en la fino de la 19-a jarcento estis nur en sia komenca stadio, kaj pro tio ni povas preteratenti tiun landon nun.

(daŭrigota)

artikolo de **Renato Corsetti** el Britio

Fonto: [https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627\\_fina?email\\_work\\_card=view-paper](https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627_fina?email_work_card=view-paper)

<sup>1</sup> *El la himno de la Esperanto-movado*: [https://it.wikipedia.org/wiki/La\\_Espero](https://it.wikipedia.org/wiki/La_Espero) .

<sup>2</sup> *Vidu Zamenhof, Ludwik L. Provo de Gramatiko de Novjuda Lingvo kaj Alvoko al la Juda Intelektularo, tradukis el la rusa Adolf Holzhaus (kun rusa originalo). Helsinki: Fondumo Esperanto, 1982.*

<sup>3</sup> *Temas pri: Benedikt Hjartarson, Anationalism and the Search for a Universal Language: Esperantism and the European Avant-Garde, manuskripto en la angla de artikolo pri la sama temo aperinta en la universitata revuo de Rejkjaviko. Estas interese legi la tutan resumon. Abstract: This paper analyses the relations between esperantism and the activities of the historical avant-garde on two different levels. Firstly, it discusses how both Esperanto and the avant-garde represented a radical response to the growing impulse of nationalist ideology in Europe and aimed, in different terms, at the creation of a new universal or 'anational' language. Secondly, the paper aims at a historical reconstruction of the connections between the transnational networks of Esperanto and the historical avantgarde, by focusing on publications of avant-garde texts in journals and anthologies in Esperanto and publications of texts in Esperanto in avantgarde journals in the early 20th century, as well as on original experimental literature written in Esperanto in the period. The literary system of Esperanto served as a decentralised forum in which works and aesthetic concepts were picked up from the* >>18



por ni anstataŭe  
jam restas ne ondo ne nub' sed papav'  
de iu sur pad' en mallum' disŝetita

vi scias  
ke estas ĝi tie - grajnetoj por ni nevideblaj -  
en ĉiu jam floras la visko de mia forgeso  
kaj jam nereveno en ĉiu vidiĝas  
ŝlosil' de malemo  
indic' de l' finado

vi aŭdas  
ke l' noto l' plej longa per sono tre alta  
forlavas la tuŝojn de l' noktoj frenezaj  
ke per la tagiĝo marŝaŭm' surhaŭtiĝas

vi vidas  
ke mi surbordiĝas denove  
en mito alia

\*\*\*

kaj ie en ies sonĝo  
malantaŭ la dorso  
la suno -  
balon' flavkolora kaj gaja -  
falas jam transhorizonten  
kaj laŭ la deklivo ruliĝas -  
lasante sursable nur spuron fajran

kaj nun  
jam senzorge, facile  
konsentas vi pagi la plej altan prezon  
por ke  
la porcelano la plej delikata de birda kantado  
kaj vitroj koloral de lagoj, tapiŝoj de floroj flugantaj  
kaj bronzo de pluvoj tra la nubkasteloj

por ke  
la karavana daŭrado - pasado  
la silka printempa  
eringi'  
vagabonda  
dronigu  
vin  
super  
la kapo

\*\*\*

kia malĝoj' vin turmentas sur la vojkruciĝo  
simile al vundo delonga kaj nesaniĝita  
kia malgajo portadas kaŝe

endormiĝintajn grupojn en la korbo?  
kiam la suno forestas  
kaj muelejoj  
sur la forlasita rivero tufojn nebulajn  
muelas  
kaj la muelisto ŝutas en sakojn  
viajn ĉirkaŭvojojn  
ĉi tio ne estas unuafoje por vi  
kaj certe ne lastafoje  
vagi ĉi tie  
kie la tagoj konfuziĝas  
kie vi ridas komence  
kaj poste vi perdas  
kaj denove komence  
kaj ree inverse

kie malvoj  
tra rompigitaj fenestroj  
plu floras ruĝe kaj blanke  
kaj en la pajla tegmento  
kiel en la koro  
birda nesto  
eksplodas



poemoj de **Marija Mikicej** el Ukrainio

elukrainigis kaj sendis **Petro Palivoda** el Ukrainio



ilustraĵo de *Olena Jasinska*

La terenaŭto kriegante grimpis sur la kruta montetdeklivo. La viro forte tenegis la direktilon. La radoj kuris sur la sekaj tigoj restintaj ĉi tie de la pasinta somero. Dum minuto ili alveturis la supron. De tie ili povis ĉirkaŭrigardi, la mondo fariĝis ega. La knabino finfine deprenis la manon de la tenilo malvarma:

– Kiel belege estas ĉi tie, avo mia!

Ĉiam ŝi diris al li "avo mia". Sed li tute ne estis maljuna, nun havis iom pli ol kvindek du. Sed ja la hararo jam blankiĝis. Malofte li ridetis, ne ŝatis ja la malvarmon. Sed en tiu ĉi decembra tago oni jam vekiĝis je frostoj. Sur la fenestroj de la domo ekis glacifloroj, la kampon kovris prujno.

– Bele – li kapjesis. La motoro nun milde bruetis, la bone kurantaj radoj staris pretaj je eksalto. La viro eme ĉirkaŭrigardis. La foraj montoj ŝajnis esti proksimaj, la aero fariĝis travideblega kaj malmola. La urbo restis fore, la montetoj elsorĉis la silenton. Tiun silenton li ŝatis aŭskulti, do deŝaltis la motoron. Li amis la ventuman montetdeklivon, precipe somere. Ankaŭ tiutempe li ofte staradis ĉi tie inter la grizaj rokoj elstarantaj el la tero. Li enspiris la aeron kunodoro de greso. Somere kaj aŭtune sovaĝaj floroj flavis ĉi tie kaj birdoj flugis foren...

Sed nun estis vintre. Tago de Kristnasko, malfruposttagmeze. Dum la familio pretigas la kristnaskan arbon, li forigis la nepinon el la domo. El la foro ekbriletis la malalta turo de la preĝejo. Feliĉe ĉirkaŭe estas ankoraŭ arbaroj, montetoj. Tiuj donas sencon ankaŭ al la urbo.

– Kiam neĝos? – demandis la infano. La patrino ŝin terure vestigis, apenaŭ ŝi povis moviĝi. Ankaŭ la sekurzono bremsis ŝiajn movojn.

Nur la grandaj brunaj okuloj rigardis la viron.

– Certe hodiaŭ – asertis la avo decidvoĉe.

– De kie vi scias? – ŝi scivolemis. "Ĉion ŝi volas scii... kiel siatempe ankaŭ mi... Oni ofte batos ŝin pro tio en la vivo. Same kiel min..."

– Mi sentas ties odoron – en la aero vere troviĝis ioma neĝodoreto, sed tion sentis nur la sperta plenkreskulo. Ankaŭ la knabino flaretis la aeron, amuze movante sian nazeton. Videble ŝi nenion sentis. La viro ridetis kaj silentis. La nuboj rapide kolektiĝis, ilia grizo jam forigis la sunon. Fore la rivero trankvile kurbiĝadis, sur la bordo ie moviĝis nigraj makuloj. Eble hundoj vagantaj? Super ili traflugis grupo de frugilegoj. Inter la foraj poploj nun nudaj videblis la ŝoseo; tre malofte veturis iu aŭto.

La silento iĝis en ilin, fariĝis ilia. La knabino vidis aliborde la vagonaron: ruĝkapa metala raŭpo grimpis

malrapide. La ruĝan lokomotivon sekvis aro da nigraj vagonoj. Tiel ĝi foris, ke ili malaŭdis eĉ la bruon. La viro fermis la okulojn. Kiom da jaroj pasis jam ekde..? Tridek, aŭ pli multe? Pli multe. Eble eĉ kvardek pasis, de kiam li venis ĉi tien kiel infano, la unuan fojon sola. Li staris sur la monteto kaj subenrigardis la valon. Ekde tiam li ne scipovis liberigi sin de tiu ĉi regiono. Ĉio grava okazinta al li en la vivo – okazis ĝuste ĉi tie.

– Rigardu, avo mia, hundoj! – diris subite la knabino kaj per brako trovestita montris antaŭen.

– La vagantoj pelas ion... – opiniis la avo. Vintre ofte iradas tie la hundoj ĉasantaj surborde ripozantaj anasojn, precipe sensukcese. Kion ili nun trovis? Ĉiuj tri hundoj kuregis samdirekten, videble ili pelis ion malgrandan, kiun la homoj elfore eĉ ne vidis. Tamen la nevidebla io movis en li la volon. Malŝatis li, se kelkiuj atakis unusolan kontraŭulon. Do la viro ŝaltis la motoron:

– Tenu vin forte, etulino!

La aŭto subenkuregis skuiĝanta, rapide ŝanĝiĝis la pejzaĝo. Malaperis la montetoj, ili kuregis sur la malfermita ĉeborda kampo. Li rapidigis la veturilon. La hundoj ĉirkaŭis iun objekton surterene, unu el ili persiste alsaltadis ĝin. La viro rekonis la objekton, estis ĝi iama saliko. La ventoj ĝin malrektigis, poste la arbo mortis kaj sekiĝis. La herbejo ankaŭ nun estis humida, sed la radoj nun kuregis sur tero glaciiginta.

La hundoj kolere bojegis. Estis ili flavaj kun abunda vosto kaj montris blankan dentaron al la proksimiĝantaj. La knabino iom ektimis kaj rigardis al la avo. Do ŝi tuj trankviliĝis – jes ja, la avo estis ĉi tie. La plej granda kaj forta homo en la mondo, kredis-sciis la infano.

La plej malgranda hundo manie bojis, per voĉo ĝi anstataŭis la mankantan kuraĝon. Tamen ĝi forkuris kolera, la aliaj du murmurantaj atendis.

Sur la malrekta arbotrunko sidis kato kun nigra dorso, sed blanka brusto. Estis ĝi ankoraŭ junega kaj timigita; pro la timo ĝia hararo dise staris. La du okuletoj estis malhelbluaj kaj proksimaj unu al la alia.

– Povra kateto! – diris la infano. La viro ĉirkaŭrigardis. La hundoj... eble ne atakos homon! Li forlasis la aŭton.

– Ĝi estas ankoraŭ tre juna – diris li al la nepino. – Ĝi certe naskiĝis komence de novembro. Estis ĝi malsata, do venis kapti muson. De kie ĝi scius pri la vagantaj hundoj?

Li proksimiĝis al ĝi kun mano etendita. La besteto retiris sin, malfide observanta la homon. La hundobojo eĉ nun plenigis ĝin per timo, la eta korpo tremis. La viro singarda etendis al ĝi la manon vestitan en ganto. La

kato kontraŭstaris, ungegoj tenegis la mortan, duone foriĝintan arboŝelon. Sed kaptis ĝin du ioj kun fremdaodoro, la fingroj fariĝis kradoj fermantaj ĝin. La kato miaŭis.

– Ne timu – diris la viro kaj returnis sin. Iomete li tamen rigardis la hundojn. – Rigardu, knabino, la vosteton de la kato. Ĉiu hareto staras aparte.

La knabino malpeziĝinta ridis. Jes ja, vere! Ĉiu hareto apartas.

– Kaptu ĝin singarde – li transdonis ĝin al la infano. Malrapide li ĉirkaŭiris la aŭton. Oni ne povas forkuri, eĉ ne rapidiri. La vagantaj hundoj similas al banditoj. Nur tiam ili estas fortaj, se ili vidas, ke la viktimo timas ilin. Tion la avo jam bonege ellernis inter la homoj. Do li ne rapidis kaj neniam montris al ili la dorson. Poste li sidiĝis en la aŭton, fermis la pordon, kaj rapide ekis. Rekte al la plej granda hundo. Ĝi forkuris tra la herbejo. La viro ne longe ĝin postkuregis, ŝanĝis la direkton al la vojo kondukanta sur la digon ĉebordan. La hundoj restis fore, fariĝis ili pasinto.

La nuboj iom densiĝis, nur la rando de la ĉielo lumis ankoraŭ. Super la regiono sidis lumo obtuza, simila al perlamoto.

La knabino albrakumis la katon:

– Avo mia, ĉu la kato povos resti kun mi?

– Ĝi jam estas la via. Mia donaco je Kristnasko – kaj la viro rigardis al ŝi.

El la okuloj de la etulino kvazaŭ eksplodis la feliĉo. Ridis ŝia vizaĝo, la okuloj, ŝia tuto. La kato jam ne timis la motorbruon, ĝi kaŝis sin inter la du varmaj manoj. La viro enspiris la aeron. La samajn okulojn havis ŝia avino, kaj eĉ la patrino, kiam ŝi estis juneta.

Kelkfoje ili ĉiu kune biciklis sur la montetoj. Ŝia avino... Pasintjare, Kristnaske ŝi ankoraŭ vivis inter ili. Nun estos la unua Kristnasko kun la malplena seĝo ĉetoble, kun la telero dolorige blanka kaj pura sur la tablotuko. Li jam ennaze sentis la odoreton de kandeloj. Tiam en la tombejo, kaj post horo ĉe la ornamita arbeto kristnaska.

Li skuis la kapon. Grave, ke ŝi, la nepino estas ĉi tie, tuta kaj sana. Tio gravas, ekde nun jam nur tio.

Kiam ili ekvidis la randon de la urbo, jam fariĝis nigre. Super la kapoj malfermiĝis la nigraj nuboj. La posttagmezo tiel rapide fariĝis vespero, ke oni tute ne rimarkis tion. La viro super la arboj vidis la konatan tegmenton. Post minuto ili enveturos la korton. Li tre atendis tiun momenton; ŝajne varmaj, defendaj brakoj ĉirkaŭtenas lin. La domo estas la ĉio. Odoro de pinoj, kaŝejo de heĝoj, la vaporetodoro de propra tero. Malantaŭ la muroj atendas lin la varmo, la familio. Vivo lia.

Ili ankoraŭ ne alveturis la domon, kiam blankaj makuletoj aperis en la aero. La kato jam ne moviĝis, ĝuanta la karesojn. La grandegaj neĝeroj dense zigzagis en la vento, volis ili kovri la tutan mondon. Eble volis ili forigi la bruon deforan? Jam nur kelkaj birdoj kriis supre, poste haltis la tempo kaj trankviliga silento kovris la urbon.


rakonto de István NEMERE el Hungario  
Aperis en **Amparolo**, Al-fab-et-o 1997

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/noveloj/23.html>

## Infanlibro de la jaro

## -- Belartaj Konkursoj de UEA 2021

La libro **“La aventuroj de Jombor kaj Miki”** de **Julian Modest**, eldonejo Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, ricevis la premion “Infanlibro de la jaro” en la Belartaj Konkursoj de UEA 2021. La libron oni tradukis en korean lingvon.



**Bildo sen muro (Mynd án veggs)**

Ho ĉi-somere mi naĝos en la plej blua lago de Islando  
 kaj ni lasos al la suno sekigi nin  
 kaj mi devos rigardi vin  
 sed vi devos rigardi la lagon.

\*\*\*

**Ĉio (Alit)**

Anstataŭe oni pensas pri io kio estas kolhara  
 kaj kiel konvenos al ĝi vento tra kolharoj  
 sed ni ne uzu vortojn  
 nepre kaj tute ne vortojn  
 mi simple pendos en viaj haroj  
 kaj la maro sube.

\*\*\*

**Glaciejoj (Jöklar)**

Somere la glaciejoj akceptas ĝoje la serenon  
 brilas jubilaj dum varmaj sunotagoj  
 saturas nin per mensogoj.

Vintre ili diras la veron  
 tiam ili ne devas afektemi  
 kongruas kun la vetero.

\*\*\*

**Grizŝtono**

Suspektu pri feino  
 somerbirdo  
 areno ŝpinata

Neni amplu vidos vin iuj okuloj.

\*\*\*

**Iroj (Farir)**

Tutbrila tekso estas agrabla  
 por la griza cerbo  
 kaj la inafanoj laborĝojaj  
 kiuj prizorgas la kalkuladon.  
 Sed multo loĝas en la ĉambroj.

Je horizontalaj horoj  
 fremda fratino alstrebas  
 supren sur altaj dekliivoj  
 kie herboj odoras.

**Kiam oni veturas**

Kiam oni veturas laŭ la vojo forsupren el la valo  
 kaj preteris la Silentajn Altojn okazas ke multaj  
 enrigardas la retrospegulon. Tio estas nur  
 komprenebla  
 kaj primeritas bondiron. Sed ĉiam estis pri tio iel  
 sekrete.

\*\*\*

**La fajfo**

Ŝi haltas ĉe la fenestro.  
 Tiam mi aŭdis la fajfon,  
 fremdan melodieton  
 kiu ligis la momenton  
 al tiu bela nuko.

Longa tempo pasis.  
 Ankoraŭ mi aŭdas ĝin –  
 solsolan en tiu vasta senaĵo.

\*\*\*

**Evoluo**

Angulo de ombro  
 ombro de angulo

\*\*\*

**La kvara (Hin fjórða)**

La suno de julio prilumigis la betonitan tegmenton de  
 la sterkejo  
 kaj knabineto elvenis el nedifinita direkto kaj dancis  
 sur la plata kaj hela betono. Pasis duona jarcento kaj  
 denova brilis suno de julio kaj nun en Torshavn.  
 Kaj tiam mi vidis kie ŝi partoprenis la dancadon de la  
 Vigilo de Olav, ankoraŭ bela kaj gracia. Tiam mi  
 rekonis ŝin.  
 Ŝi estis la kvara feino.

poemoj de **Stefán Hörður Grímsson** el Islando  
 Tradukitaj de **Baldur Ragnarsson** el Islando

Fonto: <https://poetika.esperanto.is/>

5>> malgraŭ la premo de la najbarejo. Ĉi tiu estas filmo en kiu Belmondo havas molan rolon. Ĝi ne estas malmola filmo. Ekzemple, ne estas "pafilo" kiel en la plej multaj filmoj de Belmondo. Estas murda temo en la fono, sed ni ne vidas iun ajn pafilon en la mano de la aktoro. Sed lia cigaredo estas en lia buŝo de tempo al tempo... Estas neniu spuro de la freneza Belmondo en ĉi tiu malrapida filmo adaptita de la romano de Marguerite Duras. Ĉi tiu senseksa amrakonto finiĝas kun la foriro de Chauvin de la urbo. La virino estas kuraĝa, ŝi forlasas la bankedon en sia domo noktomeze kaj iras al la drinkejo. Ŝi ne kapablas bremsi sian pasion. Chauvin estas tie, sed malgraŭ iliaj mallonga kaj forta intimeco kaj kisoj, li taksas ĉi tiun amon nebla kaj pro tio foriras. En ĉi tiu unua periodo de filmo estas neniu spuro de lia vireca, pafiluzanta, ŝercema kaj cinika ecoj. Kiu estas ĉi tiu milda, amema, digna homo? Demandosigno pri tio restas ĉe ni.



Fakte parte la sama demandasigno validas por la

rolo de Gabriel Fouquet (Belmondo) en la filmo "UN SINGE EN HIVER (SIMIO EN VINTRO)". Fouquet, kiu ĉiam revas iri al Hispanio, kiu batalas kontraŭ imagaj taŭroj kaj agas kiel Matadoro, kiu ludas flamenkon, estas drinkemulo, frenezulo, li venas por viziti kaj forpreni sian filineton el la orfa lernejo en ĉi tiu marborda urbeto. Dum iu parolado en la hotel-telefono, li diktas reklamajn sloganojn al la persono kun kiu li parolas. Ni komprenas de ĉi tio, ke ĉi tiu viro estas artdirektoro, redaktisto aŭ io alia. Ni ne scias, kia estis lia rilato kun sia edzino. Ni scias, ke li estas viro entuziasma, revema, malkvieta, kiu redonas la pasion por drinkado al la posedanto de la hotelo: Alberto (Jean Gabin), kiu estis fakte petanto je drinkado. Tiu neforgesebla maljunulo Jean Gabin gajnas nian simpatian kun siaj, patreca, matura, sperta ecoj... Precipe en la fino de la filmo, en la sceno, kie la ekscentra ludilfaristo de la urbo, Landru (Noël Roquevert), kune kun ili, eksplodigas artfajraĵon kaj kunigas la homojn estas eksterordinara. Ĉi tiu tre bela, humana filmo montras al ni ne la alkoholulojn, sed la homojn, kiuj ne povas enpremiĝi en mallarĝajn muldilojn, kiuj volas superi la monotonecon de la vivo, kaj iliajn penojn "eskapi" de la limoj. Belmondo montras tiun frenezan, ribeleman, militeman bildon ĉi tie, sed ankaŭ en ĉi tiu filmo, li ne havas pafilon en la mano. Mi menciuj ankaŭ la majstran kaj naturan aktoradon de Suzanne Flon en la rolo de la edzino de Albert en ĉi tiu mirinda nigrablanka filmo de Henri Verneuil.

Kontraŭe al filmoj, en kiuj Jean Paul Belmondo ludas policiston, agenton (ekzemple en "Le Marginal", "Le Professionnel", "L'Alpagueur", ktp) aŭ ŝteliston (en "Le Cerveau", "Le Voleur", "Borsalino", "Le Casse", ktp), ekzistas ankaŭ la filmo "LA SIRENE DU MISSISSIPPI", kiun mi konas. Louis Mahé (Belmondo), animplena komercisto naskita kaj kreskinta en Reunio insulo, atendas sur la doko de la insulo la virinon, kiun li renkontis pere de korespondado, Julie Roussel (Catherine Deneuve), pri kiu li poste ekscias, ke ne estas la virino en la foto, sed iu alia virino. La ĉeno de okazaĵoj kaj amo, kiuj komenciĝos kiam ĉi tiu virino eniras lian vivon, trenas lin al iĝi murdisto. Ĉi tiu melodrama filmo – ĝi tiel ŝajnis al mi - de François Truffaut gravas por montri la grandecon de amo kaj pasio. Kaj kvankam Belmondo uzas pafilojn ĉi tie, ĝi ne estas furora filmo. Riĉa viro, virino, kiu kreskis en malbonaj kondiĉoj, prostituitino... Eksterlinia rilato, fideleco al amo, la daŭra konflikto inter viro kaj virino.

La sekse senhava filmo de Jean Paul Belmondo "LÉON MORIN PRÊTRE (PASTRO LEON MORIN)", en kiu ludas katolikan pastron, estas eble eĉ pli deprimanta ol la filmo "Moderato Cantabile"... Tra la filmo ni spektas, la internan animon de juna virino

(Barny), kiu iras al la pastro por konfesi, ŝiajn pensojn, ŝian samsekseman intereson al virino, kiu laboras en la sama laborejo, la labormedion kaj ŝian vivpercepton. La pastro pacience respondas al ĉiujn demandojn de ĉi tiu ateisma virino kaj donas al ŝi librojn kaj demandojn ekde ilia unua renkontiĝo. La pastro, memproviza, decidema, laborema kaj kies seksecon ni ne povas vidi, kisas la virinon nur unufoje en la filmo. Fakte ĉi tiu kiso estas nur en la sonĝo de la virino. Tamen la virino, kiu pense batalas kun ĉi tiu junulo, ne plu povas subpremi ŝiajn seksajn dezirojn kaj konfesas ilin al li. Ĝis la fino de la filmo ni scivolemas "ĉu la pastro iel agos aŭ ne?". Sed vane! Kiam la pastro estas translokiĝanta al alia loko pro labordevo, la virino venas al li kun ankoraŭ atendema sinteno sed la pastro restas kiel roko kaj faras al ŝi religiajn paroladojn. La filmo finiĝas kun la bildo de la virino promenanta en la malplena strato noktomeze pro la agonio de nerealiĝinta amo. Mi devas diri, ke Emmanuele Riva ankaŭ estas sukcesa aktorino.

"STAVISKY (1974)" kaj "LE CORPS DE MON ENNEMI (1976)" estas inter la agadfilmoj de tiuj jaroj, kiujn oni povas konsideri pli intense politikaj, kaj malkaŝas la malpuraĵon de kapitalismo.

Laŭ IMDB (la internacia filmdatumbazo), li faris entute 91 filmojn, inkluzive siajn unuajn mallongajn filmojn. La granda Belmondo daŭre ĉeestis ankaŭ sur la teatra scenejo. En sia matureco (en la 90-aj jaroj), li revenis al siaj amataj scenejoj, kiuj estis lia naskiĝloko (lulilo) kun la jenaj teatraĵoj: "Kean", "Cyrano", "Tailleur pour Dames", "La Puce à l'oreille" kaj "Frederick ou le Boulevard du Crime". Li unue paŝis sur la teatran scenejon en la aĝo de 15. Li diplomiĝis el la Pariza Konservatorio, sed ne estis akceptita en "Comédie Française".

Estas ankaŭ rakonto pri lia rifuzo de la "César premio": en la jaro 1988, li gajnis la unuan kaj ununuran "César premion" de sia kariero pere de la "Itinéraire d'un Enfant Gâté" de Claude Lelouch, kaj ĝin li rifuzis. La kialo estis la fama skulptisto César Baldaccini, kiu skulptis la premian skulptaĵon kaj nomis lin. Baldaccini iam insultis la patron de Belmondo: Paul Belmondo, kiu estis ankaŭ skulptisto.

Jes li ne estis akceptita en "Comédie Française", sed li enskrapigis sian nomon en la historion de aktorado!

Spektante la filmojn de Belmondo el la 60-aj kaj 70-aj jaroj, la veststilo de tiu tempo, la virinoj kaj iliaj stiloj eniĝis en mian kapon. Filmu fluas en niajn okulojn ne nur kun la aktoroj, sed ankaŭ kun ĉiuj dekoraj objektoj en ĝi. La komunaj objektoj, kiujn ni vidas en multaj el la filmoj de Belmondo, estas CIGARETO kaj PAFILO kaj kiel pafilo, plejparte la PISTOLO. Pro la



cigaretoj, kiun li daŭre tenis en sia buŝo, mi scivolemas kiel li ne suferis de pulma kancero? Eble tion malhelpis lia dinamiko kaj lia pasio por la vivo.

Belmondo laboris kun bonaj reĝisoroj, portretis rolulojn en belaj scenarioj, dum sia vivo de preskaŭ unu jarcento; Li prezentis la arton de aktorado, kiun mi nomas "la privilegio vivi apartajn vivojn en reala vivo", kun plezuro kaj ĝojo. Li perfidis sian unuan edzinon kun aktorino Ursula Andress. Iam li enamiĝis al Laura Antonelli dum kelka tempo kaj ili loĝis kune. Li vivis enviindan vivon kune kun belaj virinoj. Eble en la komenco li estis feliĉa kun Elodie Constant, la patrino de tri infanoj, sed por aktoroj malfacilas vivi monogame. Ekzemple, monogamuloj kiel James Stewart estas maloftaj inter la aktoroj. Estas tre probable, ke tiu aktoro ankaŭ travivis nemalkaŝitajn amojn en sia vivo. Lia filino Patricia forlasis ĉi tiun vivon antaŭ ol li. Li mortis dum fajro en la aĝo de 40... Flankenmetinte ĉi tiun doloron, li havis koloran kaj ĝojan vivon, kiun tre malmultaj homoj havas.

Mi malfacile esprimis tian longan karieron per vortoj. Por tiuj, kiuj amas lin, la ceteraj miloj da restantaj kvadratoj de filmoj estos pli klarigaj.


Bébel, post vi, mi verŝis tiom da larmoj, kiom verŝis la ĉeestantoj ĉe via entombigo. Vi estis ne nur la nacia heroo de Francio, sed ankaŭ mia heroo... La kinejoj, kie mi spektis viajn filmojn kune kun mia patro, mortis ankaŭ kun vi! La vireca modelo de mia infanaĝo kaj juneco, mia ulo Jean Paul Belmondo.

Belmondo = Bela Mondo.

Dankon, ke vi beligis mian adoleskan mondon kaj aldonis eksciton al ĝi...



verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**  
el Büyükkada insulo, İstanbul  
21 Septembro 2021



### Solvo de la krucvortenigma

	Ĵ	V	N	Ŭ	Ĵ		O	N		N	O
N	O	Ĝ	I	D	V		N	O	N	V	T
O	M		T	I	M		O	N	O	K	I
I	R	O		P	I		S	V	N	O	D
N	O	N	Ĵ	V	Ŝ		U	P	I	K	E
O	D	V	I	R							

## Aŭdienco

unuaktaĵo, Václav Havel  
tradukis Josef Vondroušek

Personoj: bierfarista ĉefo,  
Vaněk

## Enkonduka sceno

Sur la scenejo troviĝas la oficejo de bierfaristo. Maldekstre estas pordo kaj super ĝi pendas ia enkadrigita diplomo, dekstre ŝranko kaj registroteko kaj sur ili aro da bierboteloj kun diversaj etiketoj; sur la fona muro troviĝas granda nearta pentraĵo, prezentanta Ŝvejkon kaj gastejstron Palivec, sub la pentraĵo estas ornama surskribo: "Kie ŝaŭmas la biero, regas paco sur la tero", meze de la scenejo troviĝas kancelaria tablo kaj tri seĝoj, sur la tablo estas amaso da diversaj aktoj, kelkaj malplenaj boteloj de biero kaj kelkaj glasetoj.

Apud la tablo sur la planko staras botelujo. Laŭlonge de la muroj kaj ĉefe en la anguloj de la ejo troviĝas malfacile difinebla brikabrako, ekz. diversaj forigindaj ventoliloj, praa radioaparato, rompita vesthoko, stoko da malnovaj ĵurnaloj, botoj kaj simile. Kiam leviĝas kurtenego, sidas ĉe la tablo la bierfaristo en labormantelo, kun la kapo surtable kaj laŭte ronkas. Post tempeto aŭdiĝas frapado ĉe la pordo. La bierfaristo tujtuje vekiga.

**Bierfarista ĉefo:** Envenu – (envenas Vaněk en vatita laborvesto kaj botoj)

**Vaněk:** Bonan tagon –

**Ĉefo:** Ha, sinjoro Vaněk! Venu! Sidiĝu! (Vaněk nekuraĝe sidigas sin.) Ĉu bieron?

**Vaněk:** Ne, dankon –

**Ĉefo:** Kial ne? Prenu do – (La ĉefo elprenas el la botelujo botelon, malfermas ĝin, plenigas du glasojn, unu ŝovas al Vaněk, la duan tuj eltrinkas.)

**Vaněk:** Dankon –

**Ĉefo:** Nu? Kiel iras, Vaněk?

**Vaněk:** Dankon, bone –

**Ĉefo:** Devas, ĉu?

**Vaněk:** Hm. (Paŭzo)

**Ĉefo:** Kion vi faras hodiaŭ? Ĉu vi derulas?

**Vaněk:** Mi alruletas –

**Ĉefo:** Pli bone alruli ol deruli, ĉu?

**Vaněk:** Jes. (Paŭzo)

**Ĉefo:** Kiu hodiaŭ rulas?

**Vaněk:** Ŝerkezi –

**Ĉefo:** Ĉu li do venis?

**Vaněk:** Jes, antaŭ momento –

**Ĉefo:** Ebria?

**Vaněk:** Ebrieta. (Paŭzo)

**Ĉefo:** Trinku! Kial vi ne trinkas?

**Vaněk:** Dankon, al biero mi ne tre kutimas.

**Ĉefo:** Ĉu vere? Tion mi lernigos do al vi. Vi kutimiĝos! Ĉi tie ni ĉiuj trinkas bieron – jen tradicie –

**Vaněk:** Mi scias – (Paŭzo)

**Ĉefo:** Ne estu malgaja!

**Vaněk:** Mi ne malgajas. (Paŭzo)

**Ĉefo:** Nu, kio alia?

**Vaněk:** Alia?

**Ĉefo:** Nu, ĝenerale –

**Vaněk:** Dankon, elteneble –

**Ĉefo:** Ĉu plaĉas ĉi tie?

**Vaněk:** Sufiĉe

**Ĉefo:** Povus esti pli terure, ĉu?

**Vaněk:** Jes.

El „Apokrifoj“ de Karel Čapek, elstara ĉeĥa verkisto  
Traduko el la ĉeĥa al Esperanto Josef Vondroušek  
Eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1970.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova

